

中國報道

EL POPOLA

# CINIO









Al la cielo

Foto de YU JITAO



## INTER NI

Vi informis al ni la grandan sukceson pri la televida kurso La Espero en Ĉinio. Do mi volus, ke vi, se eble, donu al mi informojn, kiamaniere vi faras la kurson per televido en Ĉinio.

**ULPIANO VILLANUEVA**  
(Peruo)

*En la venonta jaro nia gazeto konigos la televidan Esperanto-kurson. Kiuj volas koni ĝin, legu la artikolojn.*

**La Red.**

Tiu ĉi revuo estas mia rimedo por propagandi Esperanton. En trajno aŭ en aŭtobuso mi ĉiam havas kun mi la revuon *El Popola Ĉinio*. Mi metas ĝin apud junulino aŭ junulo, por ke ŝi aŭ li rigardu, kaj demandis, "Kio estas tiu ĉi lingvo?"

"Ĝi ŝajnas la hispana lingvo, sed mi ne konas la hispanan."

Tiel ni komencas la diskuton. Kiam la trajno aŭ aŭtobuso alvenas al la stacio, ni parolas daŭre sur la kajo, kelkfoje unu horon poste ankoraŭ. Mi ne varbas, tamen almenaŭ informas la ĉefan aferon de la lingvo, ĉar mi kredas, ke en multaj landoj la informo mankas.

**ANDRÉ HERVOUET**  
(Francio)



# ENHAVO

## 14 Nigra trezoro

10 Longkou — urbo ĉe “Ora Marbordo”

19 Brakhorloĝo kun verda stelo

32 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (18):**

Chuxiong, koridoro meze de Yunnan

52 **LA IMPERIESTRĀ PALACO (12):**

La palaca ĝardeno kaj murdo

43 **ANTIĴVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:**

Patrina admono ● Sanktulo ● Filozofia rezono

24 Malgranda va-a pentristino Zhang Ke

18 **INTERVJUOJ:**

Kantistina vivo

## 16 La medikamenta kaj sanprotekta afero de Ĉinio

42 **POR VIA SANO:**

Ĉina ĉigong-o

48 Vizito de la Ekspozicio de Elitaj Historiaj Objektoj de Ĉinio

27 **POEMO ● KALIGRAFAJO ● PENĴRAJO:**

Pri “Neĝado ĉe rivero”

30 28 tagoj en Gobio

46 **NIA MONDO:**

La karnavalo de Binche

39 **AMUZOJ:**

Ĉina ŝako (XI)

17 Finita la unua konkurseto de legado de EPĈ

## 6 Soleno en Havano

38 **MI KAJ ĈINIO:**

Mi konas Ĉinion per Esperanto Sincera amikeco

41 **SUR NIA LIBROBRETO:**

lom da akuzo en amuzo

37 **ESP-NOVAĴOJ**

45 **POR KOMENCANTOJ:**

Estiĝo de vaksa tinkturo

4 **INTER NI**

23 **KORESPONDI DEZIRAS**

22 **KURANTAJ AFEROJ**

**SUR LA KOVRILO:**

Instruistino kaj infanoj

Foto de ZHANG SHUGUANG

2 Al la ĉielo

Foto de YU JITAO

4 Velŝipoj revenantaj


Foto de SUN ZHIJIANG

**SUR LA DORSKOVRILO:**  
**[ĈINAJ POŝTMARKOJ]**

Freskoj de Dunhuang

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Chuxiong-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco
2. Ruoqiang-gubernio
3. Longkou
4. Dongsheng



# Soleno en Havano

## — Pri la 75-a UK

Teksto de NI DONGYANG kaj LIU LING  
Fotoj de HOU ZHIPING



Prezidento Fidel Castro en la inaŭguro

En la kunveno de EPC-legantoj



Diverslandaj esperantistoj en la interkona vespero







KONGRESA PALACO  
JULIO 1990, HAVANO, KUBO  
75a UNIVERSALA  
KONGRESO DE ESPERANTO

La inaŭguro de la 75-a UK



Ĉinaj esperantistoj en la kongreso



Malgrandaj kongresanoj

**L**A ĉina 5-persona Esperanto-delegacio ekveturis la 12-an de julio per la ĉina aviadilo, al la bela marborda urbo Havano, trapasonte Ŝanhajon, Tokion, Pacifikon, San-Franciskon kaj Meksikon, por ĉeesti la 75-an Universalan Kongreson de Esperanto.

## DISTINGINDA INAŬGURO

Antaŭtagmeze de la 15-a de julio, pli ol 1 600 esperantistoj el 54 landoj kolektiĝis en la Palaco de Konferenco de Havano, duetaĝa moderne ekipita domo kun ĉefa kunvenejo kaj 11 salonoj por malgrandaj kunvenoj.

Je la 9-a horo, kiam la kuba prezidento Fidel Castro en armea kostumo ascendis la podion de la kongresejo, la tuta kongresanaro stariĝis kaj varme aplaŭdis por esprimi sian ĝojon pro lia honora ĉeesto.

La inaŭguron ĉeestis ankaŭ diplomatoj de Aŭstrio, Ĉinio, Francio, Kanado kaj Pollando.

S-ro John Wells, prezidanto de UEA, deklaris la kongreson malfermita, tuj poste la kongresanaro salutis Jesue Castillo, prezi-

danto de LKK kaj Kuba Esperanto-Asocio. La alta protektanto de la kongreso d-ro Carlos Rafael Rodriguez faris longan paroladon pri la monda strebo al paco kaj la rolo de homa interkompreniĝo. La kongreson salutis

Kubaj aktoroj prezentas dum la kongreso.



representantoj de E-societoj de 33 landoj kaj mondpartoj. Ĝojinda estas ĉeesto de reprezentanto de Albanio.

S-ro Liu Ling, delegaciestro de Ĉinio, salutis la kongreson kaj donacis al UEA lernolibron, kasedojn kaj videobendojn uzatajn por la televida E-kurso de la Ĉina Centra Televido. Tion rekompencis varma aplaŭdo de la kongresanoj.

Vespere de la 19-a de julio prezidento Castro akceptis en la Palaco de la Revolucio 150 kongresanojn kaj regalis ilin per vino. Li kuraĝigis la ĉeestantojn, ke ili ne timu, se ili sentas sin tro malmultaj. "Ankaŭ kristanismo estis el ĉ pli malgranda grupo en la komenco, sed ili venkis. Ankaŭ vi venkos." Li diris al John Wells je la adiaŭo: "Mi konsideras min soldato de Esperanto."

Dum la 7-taga kongreso, krom laborkunvenoj de UEA, okazis ankaŭ diversaj kunvenoj de internaciaj E-organizoj, prelegoj, simpozioj, seminarioj, Kongresa Universitato kaj aliaj agadoj, kiuj traktis siajn problemojn rilate al la ĝenerala temo "Esperanto, Evoluo, Kultura Diverseco" kaj iris



en atmosfero de interkompreniĝo kaj harmonio.

Dum sia kunsido en Havano la Komitato de UEA faris i.a. jenajn novajn decidojn.

1. De la 1-a de januaro 1991, s-ro Osmo Buller estos la direktoro de la Centra Oficejo, kaj de la sama dato s-ro Ian Jackson, konata iama prezidanto de TEJO, estos la ĝenerala sekretario de UEA.

2. En la lastaj tri jaroj la revuo de TEJO "Kontakto" aperis kvarfoje jare, tamen ekde 1991 ĝi aperos denove sesfoje jare.

3. Du novaj landaj asocioj de UEA estis akceptitaj, nome Estona Esperanto-Asocio kaj Ukraina Esperanto-Asocio.

4. La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) fariĝis denove Faka Asocio aliĝinta al UEA. Ĝi rezignis tiun statuson en 1974, post la hamburga krizo.

## BUNTAJ ARTAJ PROGRAMEROJ

Krom tuttaga kaj duontaga ekskursoj estis aranĝitaj por la kongresanoj ankaŭ artaj vesperoj. En la Internacia Vespero dekoj da esperantistoj de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto en multkoloraj kimonoj prezentis nacian dancon, ĵudon, florarangon, te-ceremonion por propagandi sian nacian kulturon. En la nacia vespero la prezentado de kubaj artistoj montris la lerteccon de la kubanoj en kantado kaj dancado, inkluzive de la muzika kulturo de blankuloj kaj nigruloj en kolonia tempo kaj dancoj de la 20-a jarcento, karakterizitaj per vigleco kaj gajeco, kaj tiel vekis foje-foje aplaŭdojn de la spektantoj. Ni havas belan rememoron pri tio.

## FERVORAJ LEGANTOJ DE EPC

Tagmeze de la 17-a de julio, ni okazigis kunsidon de EPC-legantoj en la salono Grabowski. Multaj venis al la salono pli frue antaŭ la komenco de la kunveno. Ĝin ĉeestis ĉ. 150 personoj el 19

landoj, kaj kelkaj el ili faris paroladon montrante siajn sugestojn kaj konsilojn al nia revuo kaj nia libroeldonado.

Nia peranto en Francio s-ino Louise Marin diris: "Unuigo Franca por Esperanto estas delonge peranto de El Popola Ĉinio, kaj mi estas la persono kiu efektivas la laboron. Ŝajnas al mi, ke Ĉinio estas malproksima de multaj landoj. Do eble ĉiuj perantoj havas similan problemon. Ĝis la momento, kiam abonanto sendas monon al la landa asocio kaj kiam li ricevas la unuan numeron de la revuo, pasas preskaŭ tri monatoj. Do, karaj abonantoj kaj abonantoj, renovigu ĝustatempe vian abonon prefere tri monatojn antaŭ la fino de la abono."

S-ino Tatjana Auderakaja el Sovetunio diris: "Mi rigardis kelkajn elsendojn de tiu televida kurso kaj partoprenis la 40-jaran jubileon de El Popola Ĉinio. Propraokule mi ĉie vidis tre multajn homojn, kiuj ege interesigas pri Esperanto, kaj grandan soifon de ĉinaj esperantistoj por plivastigi


sian nocion pri la mondo kaj por plivastigi sian internacian kontakton."

## PRI LA AZIA E-MOVADO

Ĉiujare dum la UK la Komitato de UEA okazigas siajn laborkunvenojn por diskuti kaj decidi gravajn problemojn. UEA tre atente zorgas pri la disvolviĝo de E-movado en Azio kaj ĉi-jare en Havano okazigis la kunvenon de la aziaj landasocioj, kiun ĉeestis esperantistoj de Ĉinio, Japanio, Sud-Koreio kaj Pakistano. Oni alvokis plifortigi la regionan kunlaboron de Azio. Samtempe oni okazigis publikan kunvenon rilate al la aziaj agadoj, en kiu partoprenis esperantistoj fervoraj por la azia E-movado, inkluzive iujn eŭropanojn, kiuj montris varman subtenon.

Ni revenis al Pekino jam antaŭ longe, sed tamen aperas ofte antaŭ ni la tre konataj vizaĝoj, precipe la afablaj kaj gastamaj amikoj, kiuj renkontigis kun nia delegacio, estos por ni neniam forgeseb-laj. ■

Esperantistino de la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto prezentas te-ceremonion.



# Longkou — urbo ĉe “Ora Marbordo”



La urbo Longkou

Foto de DA WEI

Farado de maiz-involukraj metiartaĵoj




Kolektado de konkoj

Foto de DA WEI





Teksto de DA WEI  
Fotoj de XU SHAOBO



Piroj eksportotaj



Fabamejaj vermicelaj produktitaj en Longkou kiel eksportajo



**G**ENERAL-DIRE, urbanoj tre ŝatas ferii ĉe maro. "Ora marbordo" kompreneble estas pli alloga. Kia ĝi estas? Mi vere ekkonis ĝian ĉarmon, kiam mi atingis la urbon Longkou ĉe Bohai-marbo.

## RIĈAJ PRODUKTOJ

Longkou situas en la nord-okcidenta parto de Shandong-duoninsulo kun areo de 889 kvadrataj kilometroj kaj malpli ol 600 000 loĝantoj. Ĝia marbordo 70 km. longa malavare oferas siajn riĉaĵojn al la urbeto: La marbordo estas ideala por kulturaj vinberojn.

La blanka sablo sur la plaĝo estas grava materialo de vitro-produkto. La vasta maro estas abunda je fiŝoj, salikokoj, kraboj, konkuloj, algoj kaj aliaj akvoproduktaĵoj. Meze de la marbordo sidas Longkou-haveno. S-ro Wang, estro de la Buroo de Havenaferoj, informis min, ke la haveno Longkou kun historio de pli ol 600 jaroj estas la plej granda komerc-haveno ĉe la suda bordo de Bohai-marbo. Navigaj linioj interligas ĝin ne nur kun aliaj gravaj havenoj de Ĉinio, sed ankaŭ kun Japanio, Koreo, Singapuro k.a. Nuntempe, en la haveno Longkou troviĝas 14 dokoj, el kiuj tri 16 000-tonelaj ankrejoj ĵus funkciigitaj duobligis la en- kaj elŝipigan povon. Ĝia jara en- kaj elŝipiga kvanto estas 7 milionoj da tunoj kaj transporta povo de pasaĝeroj — pli ol 300 000 homfojoj.

La tieaj loĝantoj ĉiam kun ĝojo parolas pri riĉiĝo de sia hejmloko. Longkou, lando de fruktoj, produktas ĉiujare 50 milionojn da kg. da pomoj, piroj, vinberoj, abrikotoj kaj aliaj fruktoj. Ĝi, abunda je tritiko, maizo, sojfabo kaj sorgo, ankaŭ estas granda grenejo. Estas fierinda por la longkou-anoj tio, ke tie latentas abundaj minaĵoj, kiuj faris la lokon energia bazo de Shandong-duoninsulo.

En la 60-aj jaroj longkou-anoj malkovris malprofundan rubandforman karbominejon kaj unuapase certigis, ke tie la totala rezervo-kvanto de karbo estas 2.6 miliardoj da tunoj. Ĉinio starigis tie la unuan karbo-bazon marbor-

dan. La ŝaktoj finkonstruitaj antaŭ nelonge produktas ĉiujare milionon da tunoj da karbo. En la 80-aj jaroj oni starigis grandan karbominejan elektrejon ĉemaran kun totala kapacito de miliono da kilovattoj. Nun jam funkcias 4 generatoroj kun kapacito de 600 000 kilovattoj en la unua kaj dua periodoj de la konstruado. Nun streĉe iras la konstruado de la tria periodo. Respondeculo de la elektrejo diris, ke la Longkou-a Elektrejo ne nur kontentigis la bezonon de la loko, sed ankaŭ liveras elektron al la elektra reto de Shandong-provinco, dank' al kio, evidente malstreĉigis la elektroprovizado en Shandong.

La ekspluato de naturaj riĉfontoj kaj fundamentaj industrioj donis flugilojn al la disvolviĝo de la Longkou-a ekonomio. En 1989 la totala industria kaj agrikultura produktovaloro de Longkou atingis 1.97 miliardojn da juanoj, kiu estas kvinobla kiom tiu de la 70-aj jaroj.

## LERTAJ KOMERCISTOJ

Promenante en Longkou, oni tre facile rimarkas, ke la tieaj foiroj prosperas, ĉar de antikve longkou-anoj estis kompetentaj en komerco. Jam en la komenco de la nuna jarcento, Longkou ja estis komerca urbo.

En la tiea libera foiro 400-metrlonga staras ŝtalaj budoj. Tie viglas pli ol 1 300 standoj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj ĉiutagaj necesaĵoj. En la Orienta Bazaro oni vendas ĉefe ĉiutagajn bezonaĵojn, marajn kreskaĵojn, specialajn produktaĵojn kaj manĝaĵojn. Estas allogaj la preparitaj manĝaĵoj. La ŝildoj montras ke tie estas vico da kokaĵ-vendistoj. El ili la plej okulfrapa estas la ŝildo kun oraj ideogramoj sur nigra fono "Spicita Koko de Maljuna Jia, Huangxian-gubernio". Ĝia mastriĉo, dika mezaĝulino, diris al mi, ke la "Stufita Koko de Maljuna Jia" preparita de ŝia bopatro, estas fama dum dekoj da jaroj. La apudaj budoj de kuiritaj kokoj estas administrataj de gefratoj kaj gefiloj de maljuna Jia. Mi demandis ŝin:

"Ĉu bone iras via komercado inter tiel multaj konkurencantoj?"

Ŝi malfermis lignan keston kaj diris al mi, montrante la bongustajn kokojn ankoraŭ vaporantajn:

"Tiu 30 spicitaĵoj kokoj elvendiĝos antaŭtagmeze. Se mia bopatro estas ĉi tie, ili vendiĝas pli rapide." Dum nia interparolo, ŝi jam vendis plurajn kokojn. La apudaj vendistoj tion ja ne enviis kaj daŭre entuziasme ofertadis al la pasantoj. Mi pensis en mi, ke la spicita koko de Maljuna Jia ja estas fama, sed liaj gefratoj kaj gefiloj preferas krei alian faman markon. Eble je tio montriĝis la moderna koncepto pri komercado de la longkou-anoj.

En la Okcidenta Bazaro, kie ĉefe vendiĝas vestoj kaj aliaj tekstilaĵoj, mi estis facile englutita de kriadoj de vendistoj, kiuj ĉiamaniere faris la komercadon. Oni diris, ke en Longkou funkcias ĉ. 8 000 komercejoj kaj la totala valoro de la pormalgranda vendo superis 500 milionojn da juanoj. Multaj longkou-anoj iris al grandaj urboj por establi entreprenon.

Dank' al la malfermo de Longkou-haveno al aliaj landoj komencita en 1985, la tieaj loĝantoj pli kaj pli disvastigis sian komercadon. Nemalmultaj varoj havas grandan debiton eksterlande. Nun viglas ankaŭ la ekstera komerco kaj teknikaj kunlaboroj. Sole en 1988, la urbo Longkou 7-foje partoprenis en la grandskalaj internaciaj ekonomiaj kaj komercaj intertraktadoj kadre de Shandong-provinco kaj la tuta lando, kontaktas centojn da eksterlandaj komercistoj, kiuj konsentis elspezi 4.6 milionojn da usonaj dolaroj por la urba konstruado. Respondeculo de la Urba Kompanio de Ekstera Komerco informis min, ke dank' al tio, ke Longkou donis grandan atenton al disvolvo de ekstera komerco kaj senĉese pliiĝis la eksportadon, nun Longkou eksportas varojn de pli ol 120 specoj el 13 kategorioj kaj vendis varojn sume je 110 milionoj da juanoj.

La fabamelaĵoj vermiĉeloj kun marko "Pagodo" estas tradiciaj eksportaj komercaĵoj specialaj de Longkou. Tiu vermiĉelo el amelo



de verda fazeolo estas delikate produktitaj en dekoj da laborprocedoj. Delikataj, elastaj, diafanaj kaj freŝigaj, la Longkou-aj vermiĉeloj ricevis de internaciaj amikoj la nomojn kiel "Drakaj Lipharoj", "Printempaj Pluvetoj" kaj gajnis altan premion — premio de Ora Laŭro, donitan de la Internacia Komisiono de Turismo kaj Bonĝustaj Mangaĵoj. Por altigi la produktopovon de la vermiĉeloj, Longkou kaj Zhaoyuan-gubernio kune fondis la Longkou-vermiĉelan Federan Kompanion. Nun ĉiujare, la vermiĉeloj eksportitaj de Longkou-haveno superis 10 000 tunojn. Ili vendiĝis en pli ol 50 landoj kaj regionoj.

Longkou estas abunda je maizo, kies involukroj estas transformitaj de longkou-anoj en eksportajn komercaĵojn. Komence, oni plektis el ili nur ĉiutagajn bezonaĵojn uzatajn hejme kaj el tio iom post iom komenciĝis komerca produkto. En la urba metiartaĵo-fabriko, mi vidis en ĝia eksponejo diversformajn plektaĵojn kiaj tapiŝoj, korboj, kusenoj k.a. kun admirindaj formoj, bildoj kaj koloroj. Laŭdire en Longkou ĉiujare ĉ. 100 000 virinoj okupiĝas pri plektado de maizinvolukroj. Hejme ili ĉiujare faras plektaĵojn valorajn je 30 milionoj da juanoj.

## "REĜO DE TONDILOJ" KAJ VILAĜAJ ENTREPRENOJ

Inter longkou-anoj konataj de mi Zhan Dekai plej profunde impresis min. Li, 50-jara maldika viro kun malalta staturado kaj simpla aspekto, estas fervora, honesta, obstina kaj kompetenta. Oni nomas lin "Reĝo de Tondiloj" el Valo". Mi aŭdis jenan rakonton:

En septembro de 1984, iu japana komercisto venis en la fabrikon de Zhan Dekai, en suda antaŭurbo de Longkou. Sidiginte, la japano elpoŝigis kupran moneron kaj forte tondis ĝin per sia hortikultura tondilo produktita de Japanio. Li faris breĉeton sur la monero, kaj la klinĝoj de la tondilo iomete difektiĝis. Zhan stariĝis kaj prenis tondilon kun marko "Flug-fiŝo" produktitan de lia fabriko. Preninte de la japano la kupran moneron, li forte



Zhan Dekai (dekstre) kontrolas la kvaliton de tondiloj.



La Longkou-a Elektrejo

tranĉis ĝin kaj faris breĉeton longan je 3/4 de la monero, sed la tondilo neniom difektiĝis. La japano ripetadis: "Estas bona la 'Flug-fiŝo.'" kaj tuj mendis 100 000 tiujn tondilojn.

La fabriko de hortikulturiloj administrata de s-ro Zhan estas malgranda vilaĝa entrepreno kun 500 laboristoj. En dekelkaj jaroj, ili venkis multajn malfacilojn kaj fabrikis hortikulturilojn kun marko "Flug-fiŝo" kiuj okupas la unuan lokon inter multaj samspecaj entreprenoj, dank' al la scienca administrado kaj eminenta kvalito de

la produktaĵoj. Iliaj produktaĵoj gajnis arĝentan premion de la ŝtato kaj vendiĝas en pli ol 30 landoj kaj regionoj.

La fabriko de hortikulturiloj estas nur unu el la pli ol 1 200 vilaĝaj industriaj entreprenoj de Longkou. En la lastaj jaroj, la vilaĝaj industriaj entreprenoj rapide disvolviĝantaj jam fariĝis grava ekonomia subtenilo de Longkou. Ilia totala industria produktovaloro superis 800 milionojn da juanoj, kiuj konsistigas pli ol duonon de tiu de la tuta urbo. ■

# Nigra trezoro

**M**I venis al Shenmu-gubernio ĉe la limo inter la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la provinco Shaanxi kaj vidis nur grandajn kaj malgrandajn sablomontetojn ondantaj senfine. Post irado de kelkaj kilometroj mi hazarde vidis vilaĝon kun 3-5 familioj, antaŭ kies pordegoj kreskas artemizioj kaj groteskaj arboj maldikaj aŭ maljunaj. Mi iris paŝon post paŝo kaj subite aperis antaŭ miaj okuloj rokoj, kampoj, ŝafaro kaj vilaĝo, tamen post momento ĉio tio dronis en dezerto. Sed ŝoseo sub la piedoj estas bela. Jam ekfunkciis proksima fervojo kondukanta al la urbo Baotou de la Interna Mongolio kaj la alia fervojo kondukanta al norda Shanxi-provinco estas streĉe konstruata.

Ĝuste sub tiu sterila flava tero

Karboministoj

kuŝas karbomaro etendiĝanta paralele kun la Granda Muro. Ĝi formiĝis en ĵuraso antaŭ 140 milionoj da jaroj kaj troviĝas en la gubernioj Shenmu kaj Fugu en la regiono Yulin, norda Shaanxi-provinco, kaj Jungar kaj Dongsheng en la suda parto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Tie la karboareo jam konata estas 24 573 kvadrataj kilometroj kaj la totala rezervokvanto atingis 231.2 miliardojn da tunoj (la totala jara karbokolekta kvanto nun en Ĉinio estas 1.04 miliardoj da tunoj) kaj per tio tiu karbokampo okupas la unuan lokon el la ok grandaj karbokampoj en la mondo. Tie la ŝoseo kaj fervojo estas konstruitaj ja por ekspluati ĝin.

En 1986 la ĉina registaro decidis ekspluati la Shenfu-Dongsheng-an Karbokampon. In-

formiĝinte ĉi tiu, Usono, Japanio, Francio, Britio, Svedio, Finnlando, Danlando kaj aliaj landoj montris grandan intereson por investo. La lokanoj antaŭe povis nur bredi ŝafojn sur malmultaj herbejoj por ŝaflano. Nun ili ege ĝojas, eksciinte, ke la registaro konstruos grandan karbokampon.

La ekspluato de la Shenfu-Dongsheng-a Karbokampo estas planita de la Pekina Huaneng-a Kompanio de Bonkvalita Karbo. La plano inkludas konstruadon de karbominejo, fervojo, ŝoseo, elekotrejo, karbokajo kun jara ŝarĝa kapablo de 35 milionoj da tunoj, diversaj publikutilaj konstruaĵoj kaj kompletigitaj ekipaĵoj de la karbokampo. Kaj oni ellaboris politikon de kolektado, transportado kaj vendado de karbo kiel triunuo. La stabejo de la karbokampo lokiĝas en Daliuta-

Subĉiela karbominejo de la Shenfu-Dongsheng-a Karbokampo





subdistrikto de Shenmu-gubernio, antaŭe netrovebla sur mapo. En la pasinteco la loko estis urbeto kun malpli ol 30 familioj, sed nun tie loĝas jam 40 000 homoj.

En iu serena postpluva tago, veturinte antaŭen laŭ Wulanmulun-rivero proksima al Daliuta, mi vizitis plurajn ŝaktojn kaj karbokolektejojn.

Tiuj ŝaktoj plejparte estas horizontalaj kaj oblikvaj laŭ montpiedo kaj parte subĉielaj. Proksime de iu vilaĝo mi vidis, ke kamparanoj forigis maldikan tavolon da flusablo kaj ŝtonetoj de seka rivero kaj sube montriĝis nigra karbotavolo, kiun oni povas facile pioĉi pecon post peco.

Tiutage, kiun ajn vojon mi iris, mi ĉiam vidis nudajn karbotavolojn kun dikeco de 2-4 metroj en dezerto kaj fosaĵo kaj inter rokoj. Ankaŭ aŭtoj, traktoroj kaj ĉevalĉaroj renkontitaj de mi estis transportantaj karbon.

S-ro Gao de la stabejo de la Shenfu-Dongsheng-a Karbokampo akompanis min en vizito de pluraj montvilaĝoj. La kortoj, porkostaloj kaj necesejoj de multaj familioj estas konstruitaj el karbopecoj. La montvilaĝa elementa lernejo havas financan malfacilon, ke iuj lernantoj sidas sur ligna tabulo subtenata de kar-




bopecoj por aŭskulti lecionon. En la vilaĝoj oni povas akiri karbon en ajna tempo kaj ajna loko, se oni ĝin bezonas. Por hejti fornon, oni diras al infanoj: "Prenu iom da karbo".

S-ro Gao diris al mi, ke en la Printempa Festo la loĝantoj ne nur lumigas lanternon tradicie, sed ankaŭ bruligas fajran turon faritan el karbo, kun alto de 1-2 metroj. Kiam la fajraj turoj ekbrulas, ili brile lumigas en la urbeto kaj la vilaĝoj la stratojn larĝajn kaj mallarĝajn, la kortojn antaŭajn kaj malantaŭajn. La pompaj fajraj turoj brulas la tutan nokton kaj la sekvan matenon restigas nur tavolon da neĝblanka cindro. El tio oni povas vidi la kvaliton de karbo. Fakuloj ekspertizis, ke la fulgokarbo produktita en la Shenfu-Dongsheng-a Karbokampo entenas malmulte da sulfuro kaj fosforo kaj donas multe da varmo. Ĝi estas supera karbo sen miksitaj ŝtonoj. Ĝi povas kontentigi la bezonon de urbaj loĝantoj kaj ne kaŭzas median polucion.

La ekspluato de la Shenfu-Dongsheng-a Karbokampo akcelas la disvolviĝon de la ekonomio kaj kulturo de la Leŭsa Altebenaĵo. Oni elektis junajn kamparanojn kaj paŝtistojn de diversaj naciecoj de la loko por trejni ilin kiel estontajn kvalifikitajn laboristojn. Iuj junuloj, kiuj ne plu lernis post finiĝo de element- aŭ mezlerneja lernado aŭ ĉesis lerni en mezlernejo, unu post alia vizitas postlaboran kurson de la karbokampo por partopreni en ties enira ekzameno de la karbokampo. Iuj kamparanoj, kiuj neniam sciis vendadon, nun ne nur vendas ovojn, sed ankaŭ funkciigas restoraciojn, gastejojn, vendejojn de medikamentoj, manĝaĵoj, vestoj k.a. Ankaŭ kamparanoj kaj paŝtistoj katenitaj de etkamparana ekonomio dum miloj da jaroj involviĝis en ondojn de komerca ekonomio kaj eniris en la novan modernan vivon.

En la lasta tago de mia vizito s-ro He Yongjiu, ĉefinĝeniero de la Shenfu-Dongsheng-a Karbo-



Elektristoj laborantaj sur la karbokampo

kampo, diris al mi, ke en la unua duono de tiu ĉi jaro estas streĉe konstruitaj 17 grandaj kaj mezgrandaj ŝaktoj kun jara produktokvanto de 8.1 milionoj da tunoj kaj ĝenerale konstruitaj ŝoseo, elektrejo kaj instalaĵoj por laboro kaj vivo. Jam ekfunkciis la unua 177-kilometra transporta fervojo inter Baotou kaj Shenmu kaj transportis 500 000 tunojn da karbo en la unua duono de 1990.

Li diris ankaŭ, ke post kompletigo de la unuaperioda konstruo de la Shenfu-Dongsheng-a Karbokampo en 1992, duono de la produktokvanto de karbo povos kontentigi eksterlandajn klientojn. En la komenco de la 21-a jarcento la karbokampo produktos 100 milionojn da tunoj da karbo jare kaj fariĝos la plej granda entrepreno en la mondo, eksportanta bonkvalitan karbon por industrio. ■

# La medikamenta kaj sanprotekta afero de Ĉinio

de FENG HUA

**K**IEL ĉiuj scias, la medikamenta kaj sanprotekta afero de lando koncernas ĝiajn nacian ekonomion kaj popolan vivon kaj ankaŭ iasence spegulas ĝian civilizacion. Kiel do statas la nuna medikamenta kaj sanprotekta afero de Ĉinio? La ekspozicio de scienc-teknikaj fruktoj de la medikamenta kaj sanprotekta afero de Ĉinio antaŭ nelonge okazigita en Pekino bone montris ĝian nunan staton.

Ĝi estis la plej granda inter la ekspozicioj okazigitaj de ĉinaj medikamentaj kaj sanprotektaj entreprenoj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949. Ĝi eksponis 2 500 fruktojn dislokitajn en 270 standoj. Ĝin partoprenis la Ministerio de Publika Sano, Ŝtata Komisiono por Naskolimigo, Ŝtata Medicina Administrado, Ŝtata Administrado pri Tradiciaj Ĉinaj Medikamento kaj Medicino, Sanprotekta Fakto de la Ĝenerala Logistika Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, Ĉina Akademio de Sciencoj, Aeronautika kaj Astronautika Ministerio, Ministerio de Fervojoj k.a., sume pli ol 900 organizoj.

La ekspozicion konsistigis 5 kategorioj de eksponaĵoj, nome tradiciaj scienc-teknikaj fruktoj de kuracado kaj sanprotektado; novaj medikamentoj ĉinaj kaj okcidentaj, kultivado de drogherboj kaj farado de medicinaĵoj; kuracaj instrumentoj kaj instalaĵoj, novaj kurac-materialoj, inĝenierio de biomedicino; naskolimigo kaj eŭgeniko; milita, profilaktika, konvaleska kaj sanprotekta medicinoj.

La eksponaĵoj ĉiuj trapasis teknikan ekspertizon, plejparto de ili estis premiita de provinco, municipo, ministerio kaj eĉ la ŝtato, kaj multaj de patentitaj teknologioj.

En la pasintaj 40 jaroj, precipe en la 10 jaroj post la ekpraktiko de la politiko de reformo kaj por-domalfermo, la ĉina medikamenta kaj sanprotekta afero multe progresis. Laŭ nekompleta statistiko, ekde 1978, 3 000 scienc-teknikaj fruktoj de medikamentaj kaj sanprotektaj entreprenoj de la lando estis premiitaj, iuj el ili proksimiĝis al la monda nivelo aŭ atingis ĝin.

La eksponaĵo "diagnozo kaj kuracado de hepata kancero", plenumita de la Hepat-kancera Instituto sub la Ŝanhaja Medicina Universitato, prezentis malsamajn terapiojn por malsamstadiaj hepat-kancerroj, kiuj akiris rimarkindan kuracefikon. La procentaĵo de klientoj, kiuj suferis de mal-

granda hepat-kancero kun diametro de malpli ol 5 cm kaj vivis 5 jarojn post kuraco, atingis 67.9%. Oni kuracas grandan hepatkanceron per gvidterapio kaj krioterapio kaj lastastadian hepatkanceron, al kiu ne eblas fari ektomion, per sinteza terapio por transformi ĝin en la malgrandan, al kiu oni faras duastadian ektomion. Ekde 1978 33 klientoj ricevis tian ektomion, la procentaĵo de suferantoj, kiuj vivis 5 jarojn post ektomio, atingis 67.9%, kio okupas antaŭan lokon en la mondo.

La eksponaĵo hemoroido-foriga injektaĵo, la unua premiita scienc-teknika frukto internacie el la ĉinaj tradiciaj medikamentoj, estas produktita de Guang'anmen-hospitalo sub la Ĉina Instituto de Tradicia Ĉina Medicino. 19 ĉinaj hospitaloj provis per 4-paŝa injektaĵo 968 kazojn, el kiuj 933 resani-

Ĉina ĉefministro Li Peng (meze) en la ekspozicio





ĝis. Tia terapio plialtigis kuracefikon, kompare kun la antaŭe uzata injekt-terapio kontraŭ interna hemoroido. La terapio estas simpla kaj sekuriga, sen komplikaĵo kaj sekvaĵo, kompare al operacio.

La "kuraca elektronika rektlinia akcelilo BJ-4", provfarita de la Pekina Instituto de Kuracaj Instrumentoj, estas avangarda instalaĵo por kuraci kanceron per radioterapio. Ĝi taŭgas por kuraci diversajn tumorojn profundajn en la korpo, ĉiufoje po unu minuton ĉiufoje. La akcelilo estis enlistigita de la ŝtato kiel surogato de importaĵo en 1988, kaj gajnis la unuan premion de ŝtata scienc-teknika progreso en 1989. La "neŭrotoksino-preventa tablojdo 85" farita de la Milita Medicina Akademio aperis la unua en- kaj eksterlande. Ĝi preventas mortigan veneniĝon kaŭzitan de pluraj specoj de neŭrotoksino kaj ĝia efiko daŭras 24 horojn.

La ekspozicio estis ankaŭ ekzameno al la ĉinaj medikamentaj kaj sanprotektaj trupoj kaj instalaĵoj.

Post 1949 la ĉina kuraca kaj

sanprotektata rondo starigis relative kompletan sistemon kun kompletigitaj fakoj, kuracado, scienc-esploro kaj instruado. La sistemo havas 134 medicinajn universitatojn kaj institutojn, 411 sendependajn esplor-instancojn, 7 ŝtatajn laboratoriojn, 14 laboratoriojn de la Ministerio de Publika Saĝo, kun 48 000 profesiaj laborantoj.

Kompare kun la ĉina medikamenta afero de 1949, la vendosumo de medikamentoj 100-oble kreskis, la totala produktovaloro de kurac-instrumenta industrio 1 000-oble kreskis, kaj la totala produktovaloro de medikamentoj el kemiaj materialoj 10 000-oble kreskis. Nun en la lando funkcias 57 institutoj pri medikamenta afero, kun ĉ. 7 500 laborantoj. Pli ol 2 000 grandaj kaj mezgrandaj medikamentaj entreprenoj havas siajn institutojn, kun 10 000 laborantoj. La ĉinmedicina sistemo de la lando funkciigas 80 universitatojn kaj institutojn, 170 sendependajn kaj filiajn institutojn, el kiuj 69 estas de almenaŭ provinca nivelo.

Praktiki naskolimigon, limigi

loĝantaron nombron kaj altigi loĝantaran kvaliton estas baza nacia politiko de Ĉinio. Ekde la 60-aj jaroj la scienc-teknikaj laborantoj persistas en servo al naskolimigo kaj naskipovaj geedzoj. Dank' al tio, la ĉina naskolimiga laboro multe progresis. La ŝtata naskolimiga sistemo funkciigas 24 esplorajn instancojn kaj starigos 2 laboratoriojn de la ŝtata nivelo. En Ĉinio la nombro de novnaskitoj malkreskis je 200 milionoj en la 18 jaroj, post kiam ekpraktikiĝis naskolimigo, kio malfruigis je 2 jaroj la "daton de 5 miliardoj da loĝantoj de la mondo".

Krome, rapide disvolviĝis ankaŭ la scienc-esplorado de la medikamenta kaj sanprotektata sistemo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj pligrandiĝis la medikamentaj kaj sanprotektataj trupoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, Aeronautika kaj Astronautika Ministerio, Ministerio de Fervojoj kaj aliaj departementoj gvidataj ne de la ŝtata medikamenta kaj sanprotektata departemento. ■

## Finita la unua konkurseto de legado de EPĈ

La unua konkurseto de legado de EPĈ jam finiĝis. Ni ricevis sume 166 respond-paperojn el 24 landoj, inter kiuj 105 estis sen eraro. La 13-an de aŭgusto ĉi-jare, respondeculo de la redakcio gvidis lotumon por premiado. La gajnintoj estas: Edouard Schertzer (Francio), Tešić Milutih kaj Bojčić Rajo (Jugoslavio), Kazuya Isikawa (Japanio), Karel Strouha kaj Emilia Kafkova (Ĉeĥoslovakio), Bavbo Perzowicz kaj Dziubinski Zdzistaw (Pollando), Robinson Mattos (Brazilo) kaj Valery Yupin (Sovetunio). Plej frue sendis al ni siajn respond-paperojn kaj tute ĝuste respondis ĉiujn demandojn niaj legantoj Cato Matos kaj Ailea Lima Costa Filha (Brazilo), kaj la lasta ricevis la specialan premion post lotumo. Ni gratulas ĉiujn gajnintojn kaj sendis al ili memoraĵojn.

La Red.

## Bonvenon al vi en Librejo Granda Muro

GRANDE MURAILLE  
GALERIE RUE RUYSBROECK, 5  
1 000 BRUXELLES  
Tel. 02/512.14.56.

La librejo duobligis sian areon por pli bone servi al la legantoj.

Por la festoj en la jarfino ni konsilas al vi viziti nian librejon, fari abonojn por via amiko aŭ aĉeti ĉinajn librojn aŭ artaĵojn.

La librejo servas:

10-18-a h. de mardo ĝis sabato kaj 9-13-a h. dimanĉe.

Kaj ankaŭ:

La 10-18-a h. de la 24-a ĝis la 31-a de decembro ĉi-jare.

# Kantistina vivo

## — Intervjuo de voĉmuzikistino Yu Yixuan

de WEI LIAO

**E**N eleganta ĉambro mi unufoje vidis s-inon Yu Yixuan, faman voĉmuzikan edukistinon kaj kantistinon. 81-jara, ŝi tamen aspektas vigla kiel 50-jara mezaĝulino.

S-ino Yu verŝajne rimarkis mian miron. Ŝi demandis kun rideto: “Mi aspektas ne sufiĉe maljuna, ĉu?”

Nia interparolo daŭris unu horon kaj duonon. Mi admiras ŝian mirindan memoron kaj klaran pensadon.

### JUNA MELOMANO

S-ino Yu naskiĝis en 1909 en klera familio en Qingxi-distrikto de Pingxiang-gubernio, Jiangxi-provinco. En la infanaĝo ŝi ellernis ludi flaĝoleton. Poste pro manko de flaĝoleto ŝi ellernis ludi kvarkordan instrumenton kaj fluton.

En 1925 ŝi trapasis ekzamenon por eniri en la Nanchang-an Unu-

an Virinan Normalan Lernejon. En la tri jaroj en Nanchang, ŝi plurfoje pasloĝis kun siaj familianoj en pitoreskejo Guling de Lushan-monto. En tiuj agrablaj tagoj ŝi ofte sole pasumis en densa arbaro, promenis laŭ padoj, libere kantante, senĝene recitante famajn poemojn kaj ĝuante belecon de la naturo. Ŝi opinias, ke ŝia amo al la naturo multe influis ŝian postan artistan vojon.

### “MISENIRO” EN LA PORDON DE VOĈMUZIKO

En 1928 post ekzameno s-ino Yu eniris en la Privatan Belartan Kolegion de Ŝanhajo por lerni pianon. En la sekva jaro ŝi ekstudis en la Ŝtata Konservatorio de Ŝanhajo. Komence ŝi volis preni pianludon kiel sian studobjekton. Tamen tiam tiu fakto ne plu akceptis studentojn, la konservatorio do decidis, ke ŝi studu voĉmuzikon portempe. Ekster ŝia atendo, tiu “portempe” destinis ŝian karieron

de la tuta vivo.

En 1933 s-ino Yu diplomigis per elstaraj sukcesoj kaj fariĝis unu el la unuaj diplomitoj de la unua konservatorio de Ĉinio. En la koncerto okazigita de la diplomitoj, s-ino Yu kantis kun patoso fragmenton el *Lucia de Lammermoor* de G. Donizetti kaj kantojn de L. V. Betoveno, E. H. Grieg kaj Liza Lehmann. En aplaŭdado ŝi faris la unuan paŝon de voĉmuzikisto.

### EKSTERLANDEN DUFOJE

Frusomere de 1935, financite de siaj parencoj kaj amikoj, s-ino Yu veturis al Usono por studi voĉmuzikon en la Instituto de Esplorist-studentoj sub Cornell-Universitato. Ŝia instruisto, Eric Dudley estis fama profesoro pri voĉmuziko kaj ĥora direktisto en tiu loko. Lia instruado estis elstara kaj severa. Li estis lerta en trejno de siaj studentoj en voĉmuziko. Li projektis repertuaron por s-ino Yu, kiu estis ne nur por ŝia estanteo, sed ankaŭ por ŝia estonteco, por ke ŝi havu stabilan bazon en voĉmuziko.

Kiam s-ino Yu finis sian studon en Cornell-Universitato en 1939, ŝi decidis tuj reveni al sia patrujo, kie ĉie brulis militfajro de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

En 1948 s-ino Yu duafoje veturis eksterlanden. Komisiite de Unesko en Parizo, ŝi faris unujaran esplorvojaĝon pri la muzika edukado en Britio, Francio, Italio kaj Svislando. Tiu esplorvojaĝo donis grandan inspiron kaj helpojn al ŝia futura voĉmuzika instruado.

S-ino Yu donis recitalojn en

S-ino Yu Yixuan





Parizo kaj Londono, en kiuj ŝi prezentis ĉinajn popolkantojn, eŭropajn klasikajn kantojn, italajn operajn ariojn kaj muzikaĵojn de anglaj, francaj kaj rusaj komponistoj. *The Times* kaj aliaj anglaj kaj francaj gazetoj aplaŭdis, ke ŝiaj voĉo kaj stilo de la prezentado estas mirindaj.

S-ino Yu finis sian esplorvojaĝon kaj senhezite revenis al sia patrujo, ĉar post nelonge la nova Ĉinio naskiĝis.

## SOPIRO AL HEJMLANDO

Kiam s-ino Yu estis eksterlande, pluraj konsilis al ŝi ne reveni. Precipe en la dua fojo, nemalmultaj alilandanoj petis ŝin okazigi recitalojn en eŭropaj landoj aŭ okupiĝi pri opero, sed ŝi opiniis, ke estas konsekvence, ke la ĉinoj revenas al sia patrolando. "Kiel ajn, mi ne povas forlasi la landon nutrantan min," ŝi insistis.

Vere, s-ino Yu profunde amas la teron ŝin nutrantan. Kiam ŝi studis en Usono, fervora pastro instigis ŝin partopreni en turnea grupo konsistanta el alilandaj studentoj, kiu veturis al 17 urboj de Florido en suda Usono. En tiuj urboj ŝi donis multajn recitalojn, antaŭ kies komenco aŭ en kies paŭzoj ŝi ĉiam, kun forta patriotismo kaj plena patoso, oratoris al spektantoj, por ke ili petu la usonan registaron ĉesi vendi eluzi-

tan feron al Japanio por ke ĝi ne fabriku armilojn nek buĉu ĉinojn.

Reveninte de Usono, s-ino Yu decidis servi al popolamaso per sia kantado. Dum kelkaj jaroj ŝi donis sennombrajn recitalojn kaj postlasis siajn piedsignojn en multaj grandaj urboj de suda Ĉinio. En tiuj recitaloj ŝi kantis popolkantojn kaj voĉmuzikaĵojn de ĉinaj komponistoj, inter kiuj la kantoj "En la Malproksima Loko", "Sur Ama Monto", "Paŝtistino" kaj "Oriolo" plej plaĉis al la spektantoj.

## NOVA STADIO

Reveninte de Eŭropo, s-ino Yu ekfunkciis kiel profesoro kaj dekano de la voĉmuzika fakultato de la Centra Konservatorio, kaj poste funkciis kiel vicedo de la konservatorio. Ŝi estis membro de la 2-6-a Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco, unu el la kompilintoj de la Muzika Volumo kaj ĉefredaktoro de la Voĉmuzika Branĉo de *Ĉina Enciklopedio*. En 1957 kaj 1960 ŝi funkciis kiel juĝkomitatano respektive en la Internacia Schumann-Koncerto en Berlino kaj voĉmuzika konkurso de la 6-a Monda Junulara Festivalo en Moskvo. Malgraŭ sia peza laboro ŝi daŭre faris prezentadon. En la 60-aj jaroj ŝi donis pli ol 80 recitalojn en- kaj eksterlande.

Poste s-ino Yu okupis sin ĉefe pri instruado. En la pasintaj pli ol 30 jaroj, dank' al sia serioza studado kaj senlaca instruado, ŝi elkulturis multajn elstarajn voĉmuzikistojn, inter kiuj estas baritonulo Li Xinchang, tenorulo Li Shuangjiang kaj sopranulino Wen Zhengping.

S-ino Yu estas diligenta ankaŭ en la voĉmuzika studado. Ŝi verkis kaj tradukis multajn disertaĵojn pri instruado, ludarto kaj lertaĵoj de voĉmuziko, kiaj "Kelkaj Problemoj en Voĉmuzika Instruado", "Francaj Artaj Kantoj kaj Iliaj Stiloj" kaj "Belkantado", kiuj ludis pozitivan rolon en la esplorado pri la voĉmuzika teorio de Ĉinio.

S-ino Yu dediĉis grandan atenton al voĉmuzikaj instruadoj kaj faris elstaran kontribuon en traduko kaj redakto de voĉmuzikaj instruadoj. Oni eldonis pli ol 20 voĉmuzikajn instruadojn kompilitajn kaj tradukitajn de ŝi.

Nun s-ino Yu daŭre kun plena energio tradukas alilandajn kantojn kaj senlace laboras super skribotablo ĉiutage.

"Estus bone, se mi ellernus plian fremdan lingvon," diris al mi tiu 81-jara sinjorino posedanta la anglan, germanan, francan kaj aliajn du fremdajn lingvojn. "Se la scioj estas granda oceano, do mi posedas nur unu guton." ■

DA WEI:

# Brakhorloĝo kun verda stelo

**A**PRILE de 1990 karavano konsistanta el japanaj kaj koreaj esperantistoj vojaĝis al la ĉina marborda urbo Qingdao. Kiam ili vizitis la Brakhorloĝan Fabrikon de Qingdao, oni montris al ili ĵus faritan brakhorloĝon kun simbolo de Esperan-

to — verda stelo. Ili tre ĝojis kaj aĉetis po kelkajn tiajn brakhorloĝojn.

Maje sendito de la fabriko kunportis pli ol 200 tiajn brakhorloĝojn al la 3-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj

Tekniko en Esperanto okazigita en Pekino. La brakhorloĝoj estis tuj elvenditaj. Post la konferenco s-ro Flom Walt, vicprezidanto de la Verda Komerca Ĉambro de Belgio, kaj lia edzino speciale veturis al Qingdao por viziti la fabrikon kaj esprimis sian volon esti

ĝiaj perantoj en Belgio.


La varman someron al Qingdao torentis somerumantoj, inter kiuj estis ankaŭ mi. Min allogis ne plaĝo de Qingdao, sed ĝia Brakhorloĝa Fabriko.

Unue mi vizitis s-ron Zhao Qiang de la vendejo de la fabriko. Tiu urĝema junulo iniciatis produktadon de brakhorloĝoj kun simbolo de Esperanto. El nia interparolo mi informiĝis, ke li lernis en Esperantokurso en Qingdao en la pasinta jaro kaj baldaŭ fariĝis maniuolo. Kun la profundigo de kono pri Esperanto, li pensis, kial ne projekti Esperantan brakhorloĝon, por ke esperantistoj portu ĝin por havigi al si pli da amikoj. Lia ideo estis aprobata de la Qingdao-a Esperanto-Asocio kaj la estro de la fabriko.

S-ro Zhao Qiang kaj koncernaj personoj dediĉis kelkajn monatojn al projektado de la brakhorloĝo kaj farado de ĝia modelilo. Post kelkfoja perfektigado de la modelilo la unua grupo da brakhorloĝoj estis elfaritaj. La ciferplato de tia brakhorloĝo prezentas terglobon kun verda stelo malsupre kaj vorto Esperanto supre. Ĉirkaŭ la terglobo ruliĝas 25 globetoj. La projekto signifas, ke esperantistoj devas lukti por paco kaj amikeco de la homaro.

La Brakhorloĝa Fabriko de Qingdao, kiel unu el la plej aĝaj grandaj tiaspecaj fabrikoj de Ĉinio, havas historion de pli ol 30 jaroj. Kun 4 000 laboristoj kaj oficistoj ĝi produktas ĉefe maŝinajn kaj kvarcajn brakhorloĝojn de pli ol 100 specoj kun markoj Jinmao, Meigui, Shuangxi k.a.

Dum multaj jaroj la fabriko sekvis la principon senĉese krei novajn specojn kaj doni grandan atenton al la kvalito. Pri tio mi multe vidis dum la vizito. Precipe en muntado kaj kontrolo de brakhorloĝoj ili estas rigoraj en ĉiu paŝo laŭ la normo. En la lastaj jaroj la fabriko uzis komputilon por fari simulan kontrolon al funkciantaj brakhorloĝoj, ke pliboniĝis la kvalito de la brakhorlo-



Fabrikestro (la dua de maldekstre) inter laboristoj

ĝoj. Por pligrandigi sian forton, la fabriko importis produktan linion de horloĝokorpo malvarme preĝita kaj tiun de kvarcomotoro kaj ciferplato kaj aliajn avangardajn ekipaĵojn, kiuj plibonigis la kvaliton kaj plibeligis la aspekton de la horloĝoj. En tutlanda juĝo pri horloĝoj en 1989 la vira kaj virina brakhorloĝoj kun marko Jinmao estis elektitaj kiel unuaklasaj produktaĵoj de la ŝtato. Laŭdire, brakhorloĝoj de Qingdao havis 16 milionojn da klientoj en Ĉinio, Hongkong, Sudorienta Azio, Eŭropo, Usono kaj aliaj landoj kaj regionoj.

Pri brakhorloĝo Jinmao la gvidantoj de la fabriko havas multajn rakontojn. Fabrikestro Qu Hecheng rakontis, ke en 1983 kamparano de Hunan-provinco skribis, ke lia brakhorloĝo Jinmao perdiĝis en rizkampo kaj post unu jaro, kiam li plugis la kampon, li trovis ĝin. Li purigis kaj streĉis ĝin kaj ĝi refunkciis bone. Aliffoje, en la printempo de 1984, en ĉeesto de vizitantoj de venda ekspozicio de brakhorloĝoj de la tuta lando, reprezentanto de la fabriko jetis 10 brakhorloĝojn Jinmao de la tria etaĝo al la malmola cementa perono. Kvankam rompiĝis la vitro de iuj brakhorloĝoj, tamen la 10 brakhorloĝoj ĉiuj funkciis bone.

Zhu Yajun, helpanto de la fabrikestro, diris: "Brakhorloĝo Jinmao eltenis la plej grandan provon en Antarkto." En la fino de

1984, kiam Ĉinio unuafoje ekspedis esplor-ŝipon al Antarkto, la fabriko tuj donacis 300 brakhorloĝojn Jinmao al esplorantoj. Post kelkaj monatoj ili revenis kun la brakhorloĝoj ankoraŭ precizaj post provado de malalta temperaturo, granda humideco kaj fortaj skuado kaj magneta kampo.

Por kontentigi malsamajn bezonojn de klientoj, la fabriko laŭeble kreis novajn specojn, meznombro kelkajn ĉiumonate. Lastatempe ĝi produktis dekoracian tablohorloĝon kun simbolo de Esperanto.

Respondeculo de la Qingdao-a Esperanto-Asocio diris al mi, ke Esperanton amas ne nur laboristoj de la fabriko, sed ankaŭ multaj loĝantoj de Qingdao. En 1992 okazos en Qingdao la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto kaj la 4-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. Qingdao varme bonvenigos esperantistojn el diversaj landoj.

*Leginte la supran artikolon kun fotoj, vi certe havas ian ideon, ĉu ne? Kun la belaj Esperanto-brakhorloĝo surpojne aŭ tablohorloĝo hejme, vi ĝuas ĉiam Esperantan etoson.*

*Ankaŭ la prezoj tre allogas: la brakhorloĝo kostas dek kvin usonajn dolarojn kaj la tablohorloĝo dek usonajn dolarojn, inkluzive de sendkostoj. Kiel peranto de la Brakhorloĝa Fabriko de Qingdao, la Ĉina Esperanto-Ligo akceptas mendojn el ĉiuj mondpartoj. Vi povas sendi en registrita koverto monbiletojn — en usonaj dolaroj — al ĈEL (P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio). Eblas pagi per banka ĝiro al la konto: A/C 008430011, Qingdao Watch Factory, ĉe Bank of China Huanghai Branch, Qingdao, Ĉinio. Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin rekte al la nomita fabriko (No. 89, Ningxia Lu, Qingdao, Ĉinio). En ambaŭ okazoj ne forgesu sendi al ĈEL kopion de via pago.*


**Ne preterlasu la ŝancon!** ■





Muntado de horloĝo

Mekanismoj por orumitaj brakhorloĝoj



La dekoracia tablohorloĝo kun simbolo de Esperanto

Brakhorloĝoj kun simbolo de Esperanto



- La totala kapacito de generatoroj de Ĉinio kreskis de 60 milionoj da kilovattoj en 1980 al 124 milionoj da kilovattoj en 1990 kaj tiel Ĉinio fariĝis la kvina lando, kies totala generatora kapacito superis 100 milionojn da kilovattoj. La jara produkto-kvanto de elektro de Ĉinio kreskis de 300.6 miliardoj da kWh en 1980 al 582 miliardoj da kWh kaj per tio Ĉinio okupas la kvaran lokon en la mondo.

- Oni elektrizis la 635.6-kilometran Guiyang-Kunming-an Fervojon kaj lastatempe transdonis ĝin al trafiko. Ĝia jara transporta kvanto kreskis de 6.9 milionoj da tunoj al 19 milionoj da tunoj, tiel ke Ĉinio multe levis sian fervoj-traffican kapablon en sudokcidentaj provincoj.

- En sudaj gubernioj de Ĉinio oni komencis uzi plur-efikan tiazolon, kiu ŝparigas trionon da rizsemoj kaj kreskigas la hektaran produktokvanton je 393 kilogramoj. Tiu scienc-esplora atingo montras, ke Ĉinio estas avangarda en la mondo en tiu kampo.

Plur-efika tiazolo estas substanco prokrastanta kreskadon de plantoj. Eksterlande oni uzas ĝin por reguligi floradon de floroj, la floran tempon de mangarboj kaj preventi kliniĝon de rizplanto.


- naskiĝis en Kantono videotelefono projektita de Ĉinio. Ĝi plenigis blankon en la moderna telekomunikado de Ĉinio.

Tiu plurfunkcia videotelefono povas longdistance sendi kaj ricevi klaran bildon per ordinara lineo. Nun oni pogrande produktas tiajn telefonojn.

- La 5-an de aŭgusto 1990 Ĉinio kaj Sovetunio kunlaboris en sendo de altatmosfera scienc-esplora balono, en Xianghe-gubernio, Hebei-provinco. La aparato sur la balono senĉese sendis al surteraj trakstacioj donitaĵojn pri astronomia observado, kosma radio kaj atmosfera mezurado en alta aero.

- Ĉinaj kaj kanadaj sciencistoj malkovris en dezerto de Junggar-baseno en la Xinjiang-a Ujgura

Fu Mingxia premiita



Sur la elektrizita Guiyang-Kunming-a Fervojo

Aŭtonoma Regiono fosilion de kompleta kranio kaj dek kolaj vertebroj de dinosaŭro, la plej grandan en la mondo. La fosilio kuŝis en malmolaj sablaj ŝtonoj ekzistantaj 140 milionojn da jaroj.

Unu el la kolaj vertebroj longas 1.6 metrojn. Oni taksis, ke la longo de la dinosaŭro superas 30 metrojn.

- Lastatempe estis muntita en la Shaanxi-provinca Observatorio la plej granda en la mondo reflektanta horizontala meridiana cirklo, kune farita de astronomoj de Ĉinio kaj Danlando.

Kun efika kalibra longo de 420 milimetroj, la cirklo estas la plej baza aparato por astra mezurado, aparte por preciza mezurado de astra pozicio, inkl. de mallumaj astroj.

- En la Dua Monda Amikeca Sportkunveno ĉinaj sportistoj Gao Min, Tan Liangde kaj Fu Mingxia, malpli-ol-12-jara, gajnis kvar ĉampionecojn de plonĝo.

- En la Unua Piedpilka Ĉampioneca Konkurso de Pokalo Marlboro Dynasty okazigita de la Azia Piedpilka Konfederacio en la tria tagdeko de julio, la sudkorea teamo per punpunkta ŝoto gajnis Dynasty-pokalon kaj la ĉina teamo subĉampionecon.

- Antaŭ nelonge finiĝis en Pekino la 31-a Internacia Matematika Olimpika Konkurso, en kiu la ĉina teamo gajnis la unuan lokon per la totala poentaro 230.

Kaj en la 22-a Internacia Kemia Olimpika Konkurso en Parizo ĉiuj kvar ĉinaj mezlernejanoj gajnis orajn medalojn kaj la ĉina teamo la teaman ĉampionecon.

- Kiel fenestro por studi geosciencon, la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo de Ĉinio ĉiam tiras atenton de sciencistoj de diversaj landoj. Antaŭ nelonge ĉina



geologo Han Tonglin konstatis post longa surloka esplorado, ke efektive ekzistas la granda glacia krusto sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, pri kiu oni longe disputis. La centra parto de la krusto kuŝas en la mezo de Tibeto. La krusto, etendiĝanta en spaco de pli ol 2 milionoj da kvadrataj kilometroj, ekzistis en la malfrua periodo de la malalta plejstoceno, kun dikeco de 1 000-1 700 metroj.

- Lastatempe la Ŝanhaja Eldonejo de Klasikajoj reprenis kaj ekdistribuis la grandan enciklopedion *Si Ku Quan Shu* en la ĉina lingvo.

Jam en 1773 oni komencis kompili la enciklopedion kaj eldonis ĝin post 16 jaroj. Kun 79 000 volumoj ĝi havas pli ol 3 500 verkojn pri politiko, ekonomio, filozofio, astronomio, historio, medicino kaj aliaj de 3 000 jaroj.

- La 15-jara knabino Du Bingchan kiel vizitanto-fakulo prelegos en fama kanada altlernejo pri la historio de kodado de ĉinaj ideografiaĵoj kaj de ŝi kompilita komplet-informa kodo de ĉinaj ideografiaĵoj.

Du Bingchan estas duaklasa mezlernejano. Post 3-jara klopodo ŝi elpensis la komputilan kodon de ĉinaj ideografiaĵoj, tre facilan eĉ por tiuj komputilmanipulantoj, kiuj havas nur elementan klarecon. La Ĉina Patenta Buroo jam akceptis ŝian peton pri patento. Ŝi petos patenton ankaŭ ĉe Usono, Britio, Kanado kaj Japanio.

- Lastatempe oni trovis grandan karstan kavernon en la turisma gubernio Yangshuo en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. la



Wu Jie (dekstre) gajnis oran medalon en la 22-a Internacia Kemia Olimpika Konkurso

kaverno kovras areon de 50 000 kvadrataj metroj. En la kaverno estas dekelkaj groteskaj stalaktitoj, ĉiu kun diametro de pli ol 10 metroj kaj alto de pli ol 40 metroj, kiujn oni nomas "Ŝtona Kolonaro".

- La supera forst-inĝeniero Xie Mingchu de Hunan-provinco esploris riĉfontojn de plantoj en Xupu-gubernio de la provinco kaj trovis novan specion rozeca orkideo rara en la mondo, kiun oni nomas "Cymbidium goeringii M.C. Xie".

Ĝiaj folioj havas arĝentkoloran randon kaj ĝiaj floroj estas kuriozaj kaj tre aromaj.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj partoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

- Bela kaj bona fraŭlino dez. kor. kun fraŭlo en Eŭropo kaj Ameriko per Esperanto aŭ la angla lingvo. Dez. kor. ankaŭ kun verkisto, sociologo, politikisto, ĵurnalisto kaj vojaĝanto, kiu baldaŭ vizitos Ĉinion. Adr.: Wang Yunjie, Tonglu Fenshui Liangguansuo, Zhejiang 311519 Ĉinio.

- Zhang Wenming, 26-j. instruisto, dez. kor. tm. pri diversaj temoj, speciale pri literaturo, poemo kaj lingvoj. Adr.: Yang Mei

Shan 4 Hao, Fuan, Fujian, Ĉinio.

- Hu Yinghua, 24-j., dez. kor. pri diversaj temoj: Kulturaj objektoj, vojaĝoj, libroj, muziko, popolaj kutimoj, E-aĵoj kaj materialoj pri E-movado. Adr.: Gong Xiao Er Chu, Tonghang Lu 12 Hao, Qiqihaer, Heilongjiang, Ĉinio 161005.

- Huang Zunru, 20-j., dez. kor. tm. Esperante aŭ angle, kolektas bk., diversajn mapojn, E-aĵojn. Adr.: Liuan Di Si Zhong Xue, Liuan, Anhui, Ĉinio 237009.

- 28-j. filatelisto dez. kor. tm., amikiĝi kun saminteresuloj kaj interŝ. diversajn filatelaĵojn. Respondo garantiata. Adr.: Wang Yuan, Dian Jie Bu, Qinghai Lü Chang, Datong, Qinghai, 810108 Ĉinio.

- Yao Qibing, 34-j., volas korespondi pri kuirarto, manĝaĵo, vojaĝo kaj aliaj. Adr.: Lü Xing Can Guan, Gao Feng Lu 317 Hao,

Nanning, 530012 Ĉinio.

- S-ino Irena Gvildiene kaj s-ro Antanas Gvildys (27-jaraj) volas korespondi kun geesperantistoj el tuta mondo pri diversaj temoj. Respondo estas garantiata. Adr.: Jurbarkas, Box-41, Litovio 234430, Lituanie-Europe.

- Tutmondajn poŝtmarkojn deziras interŝanĝi Avis Esperanto-grupo, 46022 Felonica, Italio.

- 8 junaj geesperantistoj (16-25j.) deziras korespondi pri ĉt. kun geesp-istoj el tuta mondo. Adr.: Barbara Gurtowska, ul. Lubawska 10/7, PL 58-400 Kamienna Gora, Pollando.

- 22-j. instruistino de muziko en kulturdomo deziras korespondi pri literaturo, muziko, skiado kun esp-istoj el tuta mondo. Adr.: Krystyna Bogdziewicz, ul. Jeleniogorska 21/6, PL 58-400 Kamienna Gora, Pollando.



Zhang-Ke en pentrado

"Mi vidas grapolon kaj grapolon; mi volas esperon kaj esperon."




# Malgranda pentristino

de LI QIANG



Kato minacanta orfisojn





# va-a Zhang Ke



Bovo sur monto



Sur zigzaga monta vojo



危險!  
張可九歲



媽媽快來呀!  
張可八歲

*Estas du mi-oj  
en la okuloj de la patrino,  
unu ludema mi-o,  
la alia lernema mi-o.*

*Mi ne ŝatas la mi-on ludeman,  
mi ja ŝatas la mi-on lerneman.*

La poemon voĉlegis por mi la 10-jara va-a knabino Zhang Ke. La poemo estas ŝia verko. Ankaŭ dekoj da pentraĵoj pendantaj en la eksponejo de la Naciminoritata Kultura Palaco estis faritaj de ŝi. Ankoraŭ ne finleginte la poemon, ŝi kuris nudpiede al la eksponejo por danci.

Zhang Ke estas lernema kaj ankaŭ ludema. Ŝi volas, ke ŝiaj gepatroj akompanu ŝin al zoologia ĝardeno. Tre plaĉas al ŝi la petolemaj simioj. Reveninte hejmen, ŝi ekpentras simiojn. Ju pli ŝi pentras, des pli ŝi interesiĝas. Ŝia imago estas riĉa kaj kuraĝa, kaj simioj sub ŝia peniko estas ĉiam malkvietaj kiel ŝi.

Iutage Zhang Ke pentris grandan simion sidantan surgenue kun longaj brakoj kaj gamboj kaj kun malgranda simio dancanta sur la dorso. Ŝi diris: "La granda simio estas panjo kaj la malgranda estas mi." La patrino amo estis vivece esprimita. La pentraĵon ŝatis redaktoro de *Yunnan-a Ĵurnalo* kaj publikigis en la ĵurnalo. Tiam la knabino aĝis nur 6 jarojn kaj fari-

ĝis pentristino ŝatata de la publiko.

La pentristan vivon de Zhang Ke akompanas ankaŭ la zorgemo de ŝiaj gepatroj. En la eksponejo estas montrataj ŝiaj krajon-desegnaĵoj, kiujn ŝi faris en la aĝo de 3 jaroj, ŝiaj tuĉpentraĵoj, kiujn ŝi faris en la aĝo de 4 jaroj, kaj ŝiaj delikate tapetitaj pentraĵoj, ili ĉiuj estas tre admirindaj. Ĉe la penso, ke la pentraĵoj estas faritaj de infano, naskiĝis en mi ia nedirebla sento. La petola infano ĉiutage devas pentri unu horon, plenuminte la hejmtaskon. Tio estus neebla sen kontrolo de la gepatroj.

La patrino amas la filinon kaj la lasta ne povas forlasi la patrino. En sia 8-jara aĝo la knabino, akompanate de sia patrino, venis al Pekino por partopreni en konkurso de pentrado. La patrino ne rajtis eniri la konkursejon kaj la filino preskaŭ ekploris pro tio. Papero kuŝis antaŭ la knabino, kaj ŝi prenis penikon kaj pentris malgrandan petolan simion ludantan ĉe rivereto. Kiam ĝi incitis grandan krabon, ĉi tiu katenis ĝian dekstran manon per la pinĉiloj. Ĝi ekkriegis de doloro: "Panjo, venu tuj!" La improvizaĵo bone spegulis la animstaton de la knabino kaj vekis laŭdon de la ekzamenantoj.

La progreson de Zhang Ke ak-

celis ankaŭ la zorgado de veteranaj pentristoj. La vicministro de la ĉina kultura ministerio Gao Zhanxiang tre ŝatas tiun knabino. Foje, kiam li partoprenis en la Arta Festivalo de Yunnan-provinco en Kunming, li vizitis ŝin en ŝia hejmo. Por kuraĝigi ŝin al diligenta lernado de pentrado, li verkis kvarverson dediĉe al ŝi. Ĝi legiĝas:

*Tuĉo miksas sin kun klara  
akvo,*

*floro tuj aperas sub peniko;  
malfacilojn venkas diligento,  
post ekzercoj venas ja talento.*

La 85-jara manĉura pentristino Hu Jieqing amikiĝis kun Zhang Ke. Ili kune faris la pentraĵojn "Songo", "Interparolo" k.a. La 91-jara verkistino Bingxin akceptis Zhang Ke en sia hejmo kaj kuraĝigis ŝin: "Pli bona libera disvolviĝo ol premforto. Amiketo Zhang Ke, mi deziras, ke vi libere kresku en la sunlumo kiel sovaĝa floro."

Sur vito pendis maturaj vinberoj. Zhang Ke pentris ilin, emocie dirante: "Mi vidas grapolon kaj grapolon, mi volas esperon kaj esperon." Jes! 10-jara, ŝi jam kvinfoje akiris ĉinajn kaj internaciajn laŭdatestojn por infanaj pentraĵoj, tamen ŝia vojo estas ankoraŭ tre longa. Mi deziras, ke ŝi havu unu esperon post alia. ■

#### *(Daŭrigo de p. 41)*

El "Eŭlalia": la plej modestaj taskoj *sen profesiaj postuloj*; montri modele mulditan rideton; lian menson okupis altsferaj problemoj; nemalvestite kuŝi; ĉu do je la nunioma horo vi ankoraŭ ne tagmanĝis? ŝi tuta estis nur aŭskulto; fiŝoscede observi la ĉielon; konstruaĵo ŝarĝita de historio kaj historioj; malsidiĝi; Eŭlalia prenis unu (glason) da viskio.

Aparte min interesis jena konversacio sur paĝo 93a de "Eŭlalia":

— Kiom?

— Kvindek mil planedoj (monuono).

— Novaj aŭ malnovaj?

— Novaj, kompreneble. Ali-

vorte kvin milion planedojn. La esprimo "milion planedojn" estas ekster la Esperanta gramatika regularo. Laŭ la tradicio, oni devus diri "Alivorte kvin milionojn da planedoj", ĉu ne? Do temas pri nova esprimmaniero de nombro. La demando estas: ĉu la vorto miliono povas esti uzata, same kiel nulo, nudradike?

Eble multaj longe demandas sin pri la neceso starigi limon inter la numeraloj unu, du, tri... dek, cent, mil... en unu flanko kaj miliono, biliono, miliardo, biliardo... en alia flanko. Kiel ĝene estas la laŭtlegado de grandaj nombroj en Esperanto pro la substantivaj numeraloj! Kiel oni devas laŭtlegi la esprimon "aĉeti 5 000 203 librojn"?

Eble iuj malaprobis la esprimon

"kvin milion planedojn" pro tio, ke "milion" povas esti rigardata kiel akuzativa formo de "milio", kiu signifas ion alian. Jes. Efektive en la sesdekaj jaroj mi jam rimarkis, en iu eŭropa Esperanta gazeto (verŝajne "Franca Esperantisto"), la pli oportunan formon "miljon" kaj mi eĉ uzadis ĝin en miaj skribaĵoj. Delonge mi sentas bedaŭron pro la neregulaĵoj en la numeraloj de Esperanto, sed mi hezitis iniciati diskuton pri la demando. La kuraĝaj alpaŝoj de niaj kolegoj tamen pli kaj pli firmigis mian kredon, ke frue aŭ malfrue oni detruos la limon inter la substantivaj kaj nudradikaj numeraloj kaj ankaŭ la aliajn neregulaĵojn de la numeralaj esprimoj. Ĉi-rilate mi forte rekomendas la formon "miljon" anstataŭ "milion".

Recenzis Laŭlum



# Pri “Neĝado ĉe rivero”

de DI ZI

*Sin kaŝis la birdoj en montĉeno,  
Neniu aktivis sur la vojoj.  
Surboate oldul' en pluvmantelo  
Hokas fiŝojn en la neĝa frosto.*

(de Liu Zongyuan)

Antaŭ ni imponas senfina montĉeno. Dense neĝas. Kaŝiĝas la birdoj en la ĉielo kaj vidiĝas neniu pasanto sur la vojoj. Tra blanka nebulo el neĝeroj oni povas vidi maljunulon en pajla pluvmantelo kaj bambua ĉapelo fiŝokanta surboate en frosta rivero.

La aŭtoro sukcese bildigis per 20 ĉinaj ideogramoj kvietan neĝan medion: En la blanka mondo regas pureco kaj absoluta silento. Nur maljuna fiŝisto absorbite okupiĝas per fiŝokado.

La aŭtoro Liu Zongyuan (773-819) estis eminenta literaturisto kaj progresiva pensulo en Tang-dinastio (618-907). Li havis brilajn atingojn en poemoj kaj prozoj. Li aktive partoprenis en la politika reformado kontraŭ potencaj eŭnukoj kaj aristokrato-burokratoj. Kaj pro tio li estis longe persekutata kaj degradita. La poemo “Neĝado ĉe rivero” esprimas la prematan koron kaj orgojlon de la aŭtoro.


La pentraĵo estas farita per tradiciaj metodoj de la ĉina pejzaĝa pentrarto, kun iom da dekoracia gusto. La pentristo kreis per malhelblua farbo la etoson de neĝado en montoj kaj soleca fiŝokado sur frosta rivero. Li klopodis por krei signifan etoson per kontrasto de apikaj montoj kun soleca boato kaj de blankaj neĝeroj kun rivero.

La kaligrafiaĵo estas farita en *dazhuan*-stilo, kiu povas bone esprimi la solecon kaj obstinecon aluditajn en la poemo. ■


Kaligrafiaĵo de Jin Jiezhong



己冬行畫







# 28 tagoj en Gobio

**E**N marto kaj aprilo ĉijare, karavano el japanaj kaj ĉinaj turistoj faris 28-tagan vojaĝon de pli ol 700 km laŭ la antikva Silka Vojo en Gobio. Mi estis unu el la karavananoj.

En la karavano estis 56 japanoj, kaj 28 el ili estis virinoj. La plej juna en la karavano estis 13-jara knabo.

La karavano ekiris de la urbeto Dunhuang, grava loko sur la tiam Silka Vojo, de Gansu-provinco, nordokcidenta Ĉinio, poste suden kaj okcidenten laŭ la suda branĉo de la Silka Vojo kaj fine atingis la celokon, la guberniurbon Ruoqiang, en la suda parto de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Kompreneble, tio estis nur malgranda parto de la antikva Silka Vojo.

24 tagojn ni vojaĝis surkamele. En la komenco ni ĉiuj ne konis temperamenton de la kameloj. Iuj kameloj ŝajne ne volis porti nin, kaj ofte deĵetis nin. Komence ni konsterniĝis falinte de sur kamelo, sed poste ni jam kutimiĝis al tio. Ni stariĝis, forbatis la polvon sur la vestoj kaj denove sidiĝis sur la kamelojn. Kvankam la osteca dorso de kameloj estis selita per spongo, tamen ni ankoraŭ sentis malkomfortecon sidante sur ĝi. Iuj metis sur la selon lanan litkovrilon, surtuton k.a. Sed malgraŭ tio, oni povas facile imagi, kian lacegon ni suferis, ĉar ni sidadis tiel multajn tagojn en la sama pozo.

La karavano disponis 100 kamelojn en dek grupoj ĉiu kun kamelisto. La karavano kontinuus 1 km, iam pli longe. La kameloj ordinare povis iri 5 km hore, sed ofte okazis neatenditaĵoj survoje,

tial ĉiutage ni veturis nur 30 km en 7 horoj.

Dum la vadado ni trovis nur unu loĝlokon Milan, ĉirkaŭ 80 km distance de la celoko Ruoqiang. Antaŭ 1 600 jaroj la loko jam estis grava trafika pasejo kaj strategia loko sur la Silka Vojo. Nun ankoraŭ restas iuj postsignoj de kasteloj, budhismaj pagodoj, kanaloj k.a. Tie estas ŝtata kultivejo kun 8 000 terlaboristoj. En la unuaj 5 tagoj post nia forlaso de Dunhuang ni tranoktis en ĉevojaj malluksegaj kabanoj aŭ tendoj de vojistoj. Kiam ni iris 500 km, ni renkontis 3 ujgurajn paŝtistojn en Pashikurgan. Ili portis 400 ŝafidojn de Ruoqiang 200 km fora. Jam pli ol unu monaton ili paŝtis tie. Ili reiros al Ruoqiang kun la ŝafoj, kiam ĉi tiuj grasiĝos. En tia sovaĝejo ni neatendite renkontis homojn kaj sentis grandan ĝojon kaj surprizon.

Niaj manĝaĵoj estis pli bonaj ol ni esperis. Sekvis nin kuir-aŭto kaj akvo-aŭtoj. Matene kaj vespere ni havis varmajn manĝaĵojn, kaj tagmeze ni manĝis kunportatajn mantoojn (plej populara manĝaĵo, vaporumita pasto fermentinta) kaj bovaĵojn. 6 akvo-aŭtoj provizis nin per trinkakvo. Kompreneble la akvo ne sufiĉis por bano. En la 28 tagoj ni neniun fojon baniĝis, eĉ ofte okazis, ke ni ne lavis al ni la vizaĝon en pluraj tagoj.


Tage ni rajdis sur kameloj, kaj nokte ripozis subĉiele. Kia lirika sceno estis, ke en la senlima Gobio glimis kelkaj malfortaj lumoj tra el la tendoj.

Vetero en Gobio estas kaprica. Ekz. en la unua tago post nia ekiro de Dunhuang, nin atakis sa-

bloventego. Sableroj krakis sur la vitroj de niaj okulŝirmiloj. Tuj poste nin trafis pluvego, negado kaj hajlo, malofte okazantaj en tiu sezono en Gobio. Krome, dum monto-transpasado turmentis nin alpa malsano kaj dum trapasado de glacia krusto sur rivero nin minacis danĝero. Sur altebenaĵo iuj suferis de alpa malsano kaj eĉ ne havis forton por starigi tendon. Estis tre malfacile iri sur glacia krusto de rivero. Kiam la kameloj kaj ŝarĝaŭtoj iris sur ĝi, ili povus enfali en ĉiu momento. Tia glacia krusto kontinuus pli ol 20 km. Felice, danke al la bonaj gvidistoj, ni sekure trapasis ĝin.

En la 28 tagoj ni ĝoje ĝuis la pejzaĝojn de Gobio. Komence nin ravis ondantaj oraj dunoj. Tra nebula pluveto ni rigardis la sangruĝan sunon, ĝis kiam ĝi subiris post la dunoj konturitaj de mildaj linioj. Ni ĝuis blankajn neĝmontojn sub la serena ĉielo, kaj ankaŭ blindege rebrilantaj neĝmontojn en nuba firmamento. Foje plumbaj

Apud glacia krusto en Gobio







La kamela karavano

nuboj ĉe la horizonto malrapide englutis la neĝmontojn; foje ĉe monttalio post neĝado formiĝis neĝa nebulo, kiu malrapide leviĝis al la montpinto kaj fine fariĝis nubaj ringoj kovrantaj la blankan montsupron.

Enirinte Gobion, ni rigardis foren kaj trovis, ke la horizonto formis perfektan cirkulon. Matene la suno leviĝas el sub la orienta horizonto, kaj vespere ĝi subiras en la okcidento. Fumkolono de kuir-aŭto rememorigis al mi la senmortan version de Wang Wei de Tang-dinastio "Fumkolono soras en dezerto, sundisko sobiĝas trans rivero".

Ni havis la feliĉon vidi miraĝon en Gobio. Estis serena tagmezo. Ni lante antaŭeniris okcidenten,


kaj aperis nebula peco fore antaŭ ni. Antaŭenirinte plu, ni povis vidi monton, riveron kaj verdajn arbojn en la nebulo. Ju pli ni iris antaŭen, des pli klaraj fariĝis iliaj konturoj: Kelkaj montoj staras en akvo; vico kaj vico da bluverdaj masoj tre similis al arboj. Je la 5-a posttagmeze subite aperis kelkaj basenoj norde de la nemalproksima montpiedo. Kakia montvilaĝo reflektis sian inversan ombron en ege klara akvaro. Je la 6-a kaj duono ĉio ĉi subite malaperis. Restis denove la senlima Gobio antaŭ niaj okuloj.

La vojaĝo estis ofte spicita per agrablajoj. Ekz. 5 karavananoj festis sian naskiĝtagon; paro da japanaj gejunuloj enamiĝis kaj gefianĉiĝis; kaj ankaŭ naskiĝis du kamelidoj. La novnaskitoj tuj

povis iradi post la naskiĝo, tamen ili ne povis kuratingi la trupon, kaj oni ilin veturigis per ĉaro.

Post longa pena vojaĝo ni finfine atingis la cellokon. Ĉiuj ekscitiĝis. Ke tiel multaj homoj senescepte rajdantaj sur kamelo faris longan vojaĝon laŭ la Silka Vojo, tio estas la unua fojo ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj trapasataj de la Silka Vojo. Multaj japanoj esprimis, ke ili refoje vojaĝos laŭ la Silka Vojo. La japana karavanestro s-ro Chu Inoishi jam planis sekvontan vojaĝon ĉe la finiĝo de tiu ĉi vojaĝo. Eble venontjare, aŭ post la venonta jaro, aŭ post kelkaj jaroj, denove aperos lante antaŭeniranta tinta kamela karavano en la senlima Gobio de okcidenta Ĉinio. ■

La karavano antaŭ tendaro



# Chuxiong, koridoro meze de Yunnan

La urbo Lucheng





Teksto de XU YE kaj  
WANG QINGHUA


Fotoj de XU JINYAN



Bronzaj tamtamoj



Ji-aj trumpetistoj



En foiro



**O**KCIDENTE de Kunming, la vojo Wuchidao eniras Chuxiong, koridoron meze de Yunnan-provinco. Chuxiong estas unu el la luliloj de la ĉina nacio. La malkovro de la fosilia Yuanmou-homo atestas, ke la historio de la ĉinoj komenciĝis antaŭ 1.7 milionoj da jaroj. La Yuanmou-homoj vivis multe pli frue ol pekin- kaj Lantian-homoj. Chuxiong estas ji-nacia aŭtonoma subprovinco. En la ĉina historio la prapatroj de ji-oj multe kontribuis por malfermi la Sudan Silkan Vojon. La vojo Wuchidao trairas la tutan Chuxiong. Ĝi similas al longa vekto, ĉe kies orienta ekstremo estas vasta Dianchi-lago kaj ĉe kies okcidenta la giganta Erhai-lago.

## POŝTSTACIO LUFENG

Lufeng, gubernio en Chuxiong, distanca de Kunming je 106 km., estas grava pasejo al la okcidenta Yunnan. Ekster la okcidenta porde de la guberniurbo estas

100-metra, 7-spana, pintarka ŝtonponto Xingsuqiao. La ponto masonita el ruĝaj ŝtonpecoj estas fortika. Nun sur ĝi daŭre iras homoj kaj veturiloj kiel antaŭe. Oni diris al ni, ke la ŝtonpecoj estas firme kunligitaj de mortero el kalko kaj glurizo. Oriente de la ponto staras ligna arkado kun glazurita drako supre. La 3-spana arkado estas subtenata de 4 kolumnoj kaj havas alerojn levitajn supren kaj fortikigitajn per korbejoj. Ĉiun kolonon flankas 2 plataj ŝtonaj tamtamoj kun skulptitaj drakoj kaj tigroj. Okcidente de la ponto staras ŝtonarkado kun tegolitaj aleroj kaj 9 steleoj. La gravuritaj ideogramoj sur ĝi konigas la ponto-konstruadon en diversaj dinastioj. Antaŭe tie staris flosponto. En Ming-dinastio (1368-1644) oni konstruis tie ŝtonan arkponton kun spanoj kaj en Qing-dinastio (1644-1911) oni plurfoje riparis ĝin. La ponto surhavas multajn steleojn, sur kiuj legiĝas admiraĵoj pri ĝiaj impone-

co kaj grava rolo en la interrilato inter Yunnan kaj la landinterno.


Nun Lufeng restas prospera komerca loko. Ĉiufoje elaŭtiginte tie, oni estas tuj ĉirkaŭataj de etvendistoj kaj petataj aĉeti iliajn metiartaĵojn, kiaj vestoarkoj, vestokroĉiloj kaj tondiloj. La tondiloj produktitaj de Lufeng estas akraj kaj facile uzablaj, tial ili havas grandan debiton. Estas interese, ke la tieaj tondiloj rilatas rekte kun poŝtstacio. Lufeng estis granda poŝtstacio kaj tie haltis multaj karavanoj post longa vojaĝo. Por aspekti pli vigla, multaj ĉevalkondukistoj denove hufferis siajn ĉevalojn, tial tie estis forĵetita granda kvanto da hufferoj. Kolektinte kaj iomete prilaborinte la brilantajn eluzitajn hufferojn, lertaj metiartistoj faris el ili akrajn tondilojn. Kaj tiel disvolviĝis la tiaspeca metiindustrio.

Nun ŝoseo iras de Dali al Kunming, kun longo de proks. 400 km. Antaŭe la vojo estis tre

Arkado ĉe la ponto Xingsuqiao







## TIGRO — TOTEMO DE JI-NACIO

Ĉe la vojo Wuchidao vivas multaj nacimalplimultoj, inter kiuj plejparto estas ji-oj. Nur en la Chuxiong-a subprovinco loĝas pli ol 500 000 ji-oj, kiuj ludis gravan rolon en malfermo de la Suda Silka Vojo kaj ekonomia kaj kultura interŝanĝo.

En la antikveco la ji-oj en Chuxiong adoris tigron kaj prenis ĝin kiel la totemon de sia nacio. Ili opiniis, ke la tero turniĝas puŝate de tigo, kaj surbaze de tiu mondkoncepto ili kreis originan kalendaron de 12 bestoj. Laŭ la ĉina lunkalendaro oni prenas muson kiel la unuan beston, sed laŭ la menciita kalendaro ji-oj prenas tigron kiel la unuan beston. Laŭ "Kalendara steleo de tigrino" kun surskribo en la ji-a lingvo, de antikve la tigrino estas la unua el la 12 bestoj de la kalendaro. Ankaŭ kulto kaj rito estis gvidataj de pastrino. Tio montras, ke la kalendaro de 12 bestoj estis nedisigebla de la totemismo en la matriarka socio.

La adoro al tigo speguliĝas ne nur en spirito de la ji-oj, sed ankaŭ en ilia ĉiutaga vivo. En la lokoj loĝataj de ji-oj oni elkalkulas la daton de foiro laŭ la kalendaro de 12 bestoj, kiel ekzemple, tigo-foiro, hundo-foiro kaj bovo-foiro. Tia foiro originas el tiu por kulto la tigrino-diinon kaj poste oni nombras la tagojn laŭ la animigrado de tigo, laŭvice aranĝas la datojn de foiroj kaj havas kompare stabilan terenon por negoco. Tio havas ekstreme apartan signifon en komunikado laŭ la Suda Silka Vojo.

De Chengdu la vojo Wuchidao iras plue kaj trairas 28 guberniojn kaj urbojn de 8 subprovincoj de la provincoj Sichuan, Guizhou kaj Yunnan. Tiu ĉi parto de la vojo longas ĉ. 2 000 km. Trairinte Chuxiong la vojo sin direktas okcidenten al Dali, kie kuniĝas la vojoj Wuchidao kaj Lingguandao kaj de kie komenciĝas la vojo Yongchangdao. ■

malfacile irebla. Apud ĝi funkcias 13 poŝtstacioj. Ĝenerale karavano iris nur 30 km tage. Tamen ĝuste la karavanoj kaj poŝtstacioj ludis gravan rolon en malfermo de la Suda Silka Vojo.


## FAREJO DE BRONZAJ TAMTAMOJ

Lucheng, ĉefurbo de la Chuxiong-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco, distancas de Lufeng je 70 km. Ĝi estis okcidenta landlima urbo de la antikva Dian-regno (Kunming). La antaŭa nomo de Chuxiong estis Weichu, kiu signifas ĉinlingve majestecon de Chu-regno. Fama ĉina historiisto Guo Moruo opiniis, ke la nomo Chuxiong originis de la historio, ke Zhuang Qiao, generalo de Chu-regno, kreis Dian-regnon en 770-221 a.K.

Efektive, antaŭ ol Zhuang Qiao kreis la regnon Dian, Chuxiong tenis intiman rilaton kun centra Ĉinio kaj malproksimaj lokoj de nia lando. Dank' al la Suda Silka Vojo, Chuxiong estis evidente influita de la kulturo de la regionoj Dianchi kaj Erhai, kion klare atestis bronzaĵoj elterigitaj en Wanjiaba, 3 km sudoriente de la urbo Chuxiong. En 1975-1976 oni malkovris 5 bron-

zajn tamtamojn en la prifositaj antikvaj tomboj. Ĉiu tamtamo, kun malgranda supra flanko, rimarkinde elstara ventro kaj distendiĝanta baza flanko, havas faldegojn kaj sunajn vejnojn sur la frapata flanko. Ie sur ĝia eksteraĵo vidiĝas fumaĵo, kio montras, ke ĝi evoluis el kaldrono kaj estis uzata tiam, kiam la instrumento kaj la kuirilo ne havis tre klaran distingon. Ili estas la plej fruaj el la tiaspecaj tamtamoj konataj hodiaŭ kaj en Ĉinio kaj en aliaj landoj. Post esploro oni konstatis, ke ili estis faritaj en la mezo de la Periodo Printempo kaj Aŭtuno (722-481 a.K.)

La bronzaĵaj tamtamoj kvankam ne eligas tondran bruon, tamen ilia profunda, ritma sono impresas pasie kaj mistere. Dum miloj da jaroj oni serĉis ilian naskiĝlokon kaj prezentis diversajn supozojn pri ĝi. Post esploro ĉinaj arkeologoj nun opinias, ke ili estis faritaj ĝuste en Chuxiong ĉe Wuchidao de la Suda Silka Vojo. Poste, oni imite faris tian tamtamon en aliaj lokoj kaj iompostioje aliformigis ĝin. Oni povas diri, ke la bronzaĵaj tamtamoj vidataj en la sudorienta Azio havas rilan rilaton kun tiuj de Wanjiaba.



La kovrilo de ji-a tombo, kie oni povas observi astronomiajn fenomenojn

La ponto Xingsuqiao





## ESP-NOVAĴOJ

● Por disvolvi internacie la kulturan, ekonomian, scienc-teknikan kaj komercan interŝanĝon kaj kunlaboron kaj elkulturi aron da eminentaj esperantistoj, la Hainan-a E-Asocio, la Hainan-a Branĉo de la Internacia Turismo-Servo de Ĉinio kaj aliaj unuoj kune fondis la Hainan-an Korespondan Instituton de Praktika Esperanto en la urbo Haikou majo de 1990. Ĉi-jare oni funkciigas du fakojn, t.e. Eksterakomercan Esperanton kaj Turisman Esperanton, ĉiu havas elementan, mezan kaj altan kursojn, la unua kaj dua kursoj daŭras ĉiu unu jaron, kaj la tria 6 monatojn. Entute ili daŭras du jarojn kaj duonon. La studmaniero iras ĉefe koresponde kaj estas ankaŭ persona instruo kaj praktiko.

● Por interŝanĝi spertojn de E-movado en diversaj lokoj kaj akceli disvolviĝon de la ĉina E-movado, la Liaoning-a E-Asocio okazigis de la 26-a ĝis la 29-a de julio, 1990, Esperanto-Somerumon kaj la 2-an studkunvenon pri strategio de la ĉina E-movado. La kunvenon partoprenis 33 esperantistoj el Xinjiang, Hunan, Pekino, Heilongjiang kaj aliaj lokoj. La ĉeestantoj varme diskutis pri la disvolviĝo de E-movado, laborprincipo de E-movado en la nova periodo kaj aliaj problemoj. Pluraj personoj montris, ke

E-movado devas havi finanĉan bazon kaj oni devas fari tion per siaj propraj fortoj.

● La 4-an de julio 1990 fondiĝis la Duolun-a E-Asocio, la unua gubernia Esperanto-organizo en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. La fondkunvenon ĉeestis respondeculoj de la guberniaj Propaganda Departemento, Sindikato, Komitato de la Komunisma Junulara Ligo, virina federacio, Radia Buroo kaj Eduka Buroo.

● En la mezo de julio, la Hebi-a E-Asocio, Henan-provinco, funkciigis en la urba eduka trejna centro la Unuan Mezlernejan E-kurson, kiun partoprenis 50 lernantoj. La loka televida stacio raportis pri tio.

● La urbo Slany (de la 8-a ĝis la 12-a de junio 1990) fariĝis la loko, kie esperantistoj-invalidoj festis kvinjariĝon de la fondiĝo de sia sekcio. La renkontiĝon ĉeestis entute 74 partoprenantoj el Ĉeĥoslovakio, 3 el Hungario, 6 el Pollando kaj 5 el Sovetunio. Dum la solena kunsido alparolis la ĉeestantojn ankaŭ delegito de UEA Linhart Ryznar. Oni prezentis riĉan kulturprogramon kaj plantis



Esperanto-rondeto en Hungario

du arbojn kiel simbolo de paco kaj amikeco.

● **V E N E Z U E L A ESPERANTO-UNUIĜO (VEU)** dum multaj jaroj disvastigis Esperanton senĉese kaj fervore en lernejoj, blindulaj asocioj, sindikatoj, universitatoj ktp kaj organizis Esperanto-festivalojn kaj Ekspoziciojn de E-libroj. En la pasintaj monatoj ili inaŭguris la Unuan Esperanto-Monumenton en Venezuelo. Bedaŭrinde VEU havas grandegajn problemojn pri monaj rimedoj kaj petas monhelpon en diversaj landoj.

E Ekde februaro ĉi-jare "Fervoja Esperanto-Societo" de Hispanio havas novan sidejon. Ĝi ricevis la klubejon en vestiblo de fervoja stacidomo CLOT-ARAGO. La societaj kunvenoj okazas ĉiu-lunde de la 17-a ĝis la 20-a horo. Gastoj estas bonvenaj.

## Abonu "El Popola Ĉinio"!

La abonvarba kampanjo de EPC por 1991 komenciĝis la 1-an de oktobro 1990 kaj finiĝos la 28-an de februaro 1991. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton dum tiu ĉi periodo, ricevos memoraĵojn.

Tiuj, kiuj varbas por nia gazeto novajn abonantojn kaj pagas por la abono, ricevos ĉinstilan memoraĵon laŭ sia kontribuo.

Esperanta Sekcio de la  
Internacia Libro-Komerca  
Kompanio de Ĉinio  
P.O. Kesto 313  
Beijing  
Ĉinio

# Mi konas Ĉinion per Esperanto

de MARIO PRESTINARI (Brazilo)

**Ĉ**INIO! Kie estas Ĉinio? Tiun demandon mi havis dum multaj jaroj. Ŝajnis al mi, ke Ĉinio estis io ekzistanta en alia galaksio. Se iu persono tiam estus dirinta, ke mi iun tagon interŝanĝu korespondaĵon kun Ĉinio, mi ridetus, ĉar tio ŝajnis tute nebla. Mi dubis, ĉu mi, brazilano, kiu vivas en Sudameriko sur la alia

surfaco de la terglobo kaj tute ne konas la ĉinan lingvon, povus kontaktiĝi kun tiu popolo? Tamen, pasis la jaroj, venis la terura epoko de la mondmilito kaj poste, la liberiga luktado. Kaj tiam, malgraŭ la malfacilaĵoj mi ricevis unuajn ekzemplojn de ĵurnaĵeto eldonita en Esperanto, elmontrantajn la valoran forton de la ĉina popo-

lo luktanta por libereco. Esperanto estis, do, la unua orĉeno, kiu ligis min al la ĉina popolo. Pli da tempo forpasis, kaj la revuo EPĈ fariĝis unu el la plej ŝatataj informiloj inter la monda esperantistaro, kaj mi fariĝis ĝia abonanto. Per ĝi, mi estas ĉiam informata pri Ĉinio kaj ĝia popolo, kvazaŭ ni ĉiuj loĝus kune. La distanco inter niaj landoj nenion signifas por ni. Ankaŭ la lingva malsameco nenion signifas. Ni interkompreniĝas pere de nia komuna lingvo, t.e. ESPERANTO, la lingvo de la universala paco. De tiam, mi kaj la ĉina popolo fariĝis samfamilianoj. Ni apartenas al la granda monda familio de la Universo. Esperanto estas nia lingvo kaj inter ni ekzistas frateco kaj amo. ■

## Sincera amikeco

JOZEFO KRISTIAN (Ĉeĥoslovakio)

**K**UN certa piemo mi prenas ĉiam la revuon EPĈ, kiu fariĝis por mi la plej valora kaj ŝatata Esperanta revuo kaj donas al mi ĝojon, plezuron kaj kontenton.

Kvankam mi estas 68-jara pensiulo, tamen mi sentas min junulo inter esperantistoj, ĉar mi ellernis nian komunan belsonan lingvon nur en la jaro 1983, kiam mi fariĝis pensiulo. Havante multe da libera tempo, mi decidis eklerni la Internacian Lingvon E-o kiel memlernanto. Ĉiam interesis min la fremda mondo, kiun mi povis ekkoni nur helpe de diversaj libroj, skribitaj hungare, ĉeĥe, slovake aŭ germane, ĉar bedaŭrinde mi ne regas mond-

lingvojn. Sed pere de nia komuna lingvo, mi komencis ekkoni diversajn homojn, amikojn-esperantistojn, landojn kaj mondpartojn, kies kutimoj, moroj, naturbelajoj kaj vivmanieroj ĉiam vekas en mi

grandan intereson.

Mi havas korespond-amikojn en 5 kontinentoj, el kiuj la plej juna havas 18 kaj la plej aĝa — 82 jarojn. Mi tre alte taksas nian amikecon kun samideano Cao Xinglin en la urbo Nan-

Poŝtkarto, per kiu la aŭtoro salutis la redakcion de "El Popola Ĉinio"





chang, Jiangxi-provinco, kiu estas 28-jara fraŭlo kaj entuziasma esperantisto. Li estas unu el la fondintoj de la Nanchang-a Junulara E-Asocio kaj helpis aranĝi la Filatelan Ekspozicion en Nanchang. Mia ĉina amiko ĉiam agrable surprizas min per belaj, interesaj kovertoj kaj poŝtmarkoj, kiuj surhavas specialajn Esperantajn stampojn. La kovertoj, poŝtmarkoj kaj stampoj estas por mi tre valoraj kaj mirindaj. Eksterordinare bela estas, ekz., la koverto kun aparta stampo, lanĉita honore al la 2540-a datreveno de la naskiĝo de Konfuceo; koverto kun E-a stampo emisiita honore al la historia romano pri la tri regnoj; speciala koverto lanĉita honore al la serpenta jaro; koverto lanĉita memore al la 40-jariĝo de liberigo de Nanchang; memor-koverto por fin-

konstruado de la Turo de Princo Teng; la koverto kun E-a stampo lanĉita honore al la ĉevala jaro kaj aliaj belaj kovertoj.

Nia amikeco estas sincera kaj profunda. En siaj leteroj li alparolas nin per vortoj panjo kaj paĉjo kaj ankaŭ mi akceptis lin kiel mian ĉinan filon. Lian foton mi gardas en aparta fotoalbumo, kiu estas plena de fotoj de fame konataj, elstaraj eminentuloj, politikistoj kaj ŝtatestroj kun propramane subskribo. Ankaŭ mi sendis al li foton; en kiu videblas mia familio kun genepoj.

Kiel pensiulo, mi estas abonanto de diversaj E-aj revuoj, sed kiam mi ekkonis la revuon EPĈ, mi ĉesis aboni ilin. Kial? Ĉar miaopinie EPĈ estas la plej bele presita revuo sur fajna kreta papero, kun konvenaj

bone legeblaj literoj, havanta abundon da koloraj fotoj, interesajn artikolojn, el kiuj ĉiu leganto povas elekti tiun, kiu plaĉas al li.

Mi deziras al la redaktistaro el fundo de mia koro firman sanon kaj multe da sukcesoj, por ke la legantoj estu ĉiam kontentaj kun "nia" revuo. Mi estas feliĉa, ke mi havas ĉinan korespond-amikon kaj mi estas konvinkita, ke dank' al niaj letterŝanĝoj, nia amikeco plifortiĝos kaj longdaŭros. Mi estimas la ĉinojn, ĉar ili estas inteligentaj, ĝentilaj, bonkoraj kaj servemaj, sur ilia vizaĝo neniam mankas rideto.

Por vi, karaj redaktoroj, mi sendas poŝtkarton kun Esperanta saluto el mia fora lando, kiun akceptu kun tia ĝojo kun kia mi ĝin sendis al vi. ■

## AMUZOJ

# Ĉina ŝako (XI)

de RONG HUI

## FINA STADIO (4)





### 4. Fina Stadio kun Ĉaro

En tiuj finaj stadioj, sur la ŝaktabulo restas nur ĉaro kiel la ĉefa ataka ŝakpeco.

En la bildo 1 la ruĝa partio per ĉaro batalas kontraŭ la nigra partio kun ĉevalo kaj du gvardianoj kaj venkas, artifice kaptinte la nigrajn gvardianojn. La konkretaj paŝoj estas jenaj: La ruĝa ĉefgeneralato moviĝas de la 5-a linio al la 4-a, la nigra ĉefgeneralato sur la 6-a linio retiriĝas unu paŝon; la ruĝa ĉaro moviĝas de la 4-a al la 2-a, la nigra ĉefgeneralato moviĝas de la 6-a al la 5-a; la ruĝa ĉefgeneralato moviĝas de la 4-a al la 5-a, la nigra ĉefgeneralato moviĝas de la 5-a al la 6-a; la ruĝa ĉaro sur la 2-a moviĝas antaŭen kvar paŝojn kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, la nigra ĉefgeneralato sur la 6-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la ruĝa ĉefgeneralato moviĝas de la 5-a al la 4-a, la nigra partio devigite movas sian gvardianon de la

5-a antaŭen al la 4-a; la ruĝa ĉaro moviĝas de la 2-a al la 6-a kaj kaptas la nigran gvardianon, la nigra gvardiano retiriĝas de la 4-a al la 5-a; la ruĝa ĉaro sur la 6-a retiriĝas unu paŝon, la nigra partio devigite retiras sian ĉefgeneralon unu paŝon; la ruĝa ĉaro moviĝas de la 6-a al la 5-a kaj kaptas la alian nigran gvardianon. La nigra partio estas venkita.

En la bildo 2 la ruĝa partio per unu ĉaro batalas kontraŭ la nigra partio kun ĉevalo kaj du elefantoj. La nigra partio defendas sin per ĉenaj elefantoj por atingi paciĝon, sed la ruĝa partio venkas, unue artifice kaptinte la nigran ĉevalon kaj poste unu elefanton. La konkretaj paŝoj estas jenaj: La nigra ĉefgeneralato moviĝas de la 5-a al la 6-a, la ruĝa ĉaro moviĝas de la 6-a al la 5-a; la nigra ĉevalo moviĝas de la 5-a antaŭen al la 7-a, la ruĝa ĉaro sur la 5-a retiriĝas tri paŝojn por kapti la ĉevalon; la nigra ĉevalo retiriĝas de la 7-a al la 8-a, la ruĝa ĉaro moviĝas de la 5-a al la



4-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon; la nigra ĉevalo moviĝas de la 8-a antaŭen al la 6-a, la ruĝa ĉefgeneralo moviĝas de la 5-a al la 4-a; la nigra ĉefgeneralo moviĝas de la 6-a al la 5-a, la ruĝa ĉaro sur la 4-a moviĝas antaŭen unu paŝon kaj kaptas la nigran ĉevalon; la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a retiriĝas unu paŝon, la ruĝa ĉaro sur la 4-a moviĝas antaŭen du paŝojn kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon; la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la ruĝa ĉefgeneralo sur la 4-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la nigra ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon, la ruĝa ĉaro moviĝas de la 4-a al la 5-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon; la nigra ĉefgeneralo moviĝas de la 5-a al la 4-a, la ruĝa ĉefgeneralo moviĝas de la 4-a al la 5-a; la nigra ĉefgeneralo sur la 4-a retiriĝas unu paŝon, la ruĝa ĉefgeneralo sur la 5-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la nigra elefanto moviĝas de la 9-a antaŭen al la 7-a, la ruĝa ĉaro moviĝas de la 5-a al la 3-a kaj kaptas la nigran elefanton.

En la bildo 3 la ruĝa partio per unu soldato kaj ĉaro batalas kontraŭ la nigra partio kun ĉaro. Ŝajne la du partioj ne povas venki unu la alian, sed la ruĝa partio lerte okupas la centran linion per sia ĉefgeneralo kaj akiras la venkon. la konkretaj paŝoj estas jenaj: La ruĝa partio movas sian ĉefgeneralon sur la 4-a antaŭen unu paŝon, tio ŝajne estas sencela paŝo, sed fakte ŝlosila por la venko. Ĉar unupaŝa retiriĝo de la nigra ĉefgeneralo sur la 4-a aŭ moviĝo al la 5-a ne povas helpi la nigran partion eviti malvenkon, la nigra ĉaro ne povas moviĝi antaŭen kaj devigite forlasis la centran linion. Tiel la ruĝa partio venkas, uzante sian soldaton.

En la bildo 4 la ruĝa partio per ĉaro kaj ĉevalo batalas kontraŭ la nigra partio kun du elefantoj, du soldatoj kaj ĉaro. La ruĝa partio aspektas en malfavora situacio, sed la ruĝaj ĉaro kaj ĉevalo faras kuran atakon senĉese, kaptas la nigran soldaton sur la 4-a linio kaj venkas fine. La konkretaj paŝoj estas jenaj: La ruĝa ĉevalo reti-

riĝas de la 7-a al la 6-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, la nigra ĉefgeneralo moviĝas de la 5-a al la 4-a; la ruĝa ĉaro moviĝas de la 4-a al la 6-a kaj kaptas la nigran soldaton, la nigra soldato sur la 6-a moviĝas antaŭen unu paŝon; la ruĝa ĉevalo moviĝas de la 6-a antaŭen al la 4-a kaj ŝakigas la nigran ĉefgeneralon, la nigra ĉefgeneralo moviĝas de la 4-a al la 5-a; la ruĝa ĉaro sur la 6-a moviĝas antaŭen kvin paŝojn kaj faras mortigan ŝakigon al la nigra ĉefgeneralo. ■

### ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
FR Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00

#### Por aliaj landoj en Eŭropo:


USD	11.50	18.50	26.00
-----	-------	-------	-------

#### Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD	7.80	12.50	17.50
-----	------	-------	-------



# Iom da akuzo en amuzo



*SEP VANGOFRAPOJ* de Károly Aszlányi, tradukita el la hungara de Laszlo Somlai (Spierer), dua eldono de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato 20 x 14cm. 148 p. Prezo: 15 gld.

*EŬLALIA* originala romano de Lorjak, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 19.5 x 14cm. 188 p. Prezo: 17 gld.

Jen estas du romanoj riĉe remburitaj per animkatenaj epizodoj taŭgaj por amuzi legemulojn por pasigi enuigajn horojn, kaj en la distra amuzo tamen detekteblas iom da akuzo pri la maljusto en la socio.

Ĉu “Sep Vangofrapoj” estus farotaj de vi al ŝtalreĝo, se vi vin turnus al li por helpo kaj estus rifuzita? Eble ne, ĉar vi konsiderus tion kiel frenezajon. Sed sinjoro Tenson MacPhab, londona teknikisto kaj eksarmeano, kiu montris sian meritoplenan bravecon en la Unua Mondmilito kaj savis la nevon de la ŝtalreĝo Terbanks, anoncis en ĵurnaloj, ke li donos sep vangofrapojn al la magnato Terbanks en unu semajno sub atesto de la publiko pro tio, ke tiu ĉi rifuzis doni oficon al la senlabora Tenson kaj krome tiu fierulo solide lavis lin per la riproĉo “Sufiĉe! La vivo jam instruos vin, junulo, kiel granda numero estas la sep! Foriru!”, kiam li aŭdis la grumblon de Tenson, ke li eĉ ne havas monon por pagi la loĝejan lukoston kaj pro “sep aĉaj pundoj” oni elloĝigos lin. Malgraŭ lia merito en la milito kaj savo de la vivo de la magnata nevo, sinjoro Terbanks kategorie rifuzis helpi Tenson, kiu restis senlabora jam dum tuta jaro!

Tenson brulis kun venĝemo kaj volis instrui la ŝtalreĝon per sep vangofrapoj, ke tiu ĉi bone lernu kaj laŭvalore taksu la gravecon de la numero sep. Per siaj artifikoj kaj ruzoj li sukcesis doni sinsekve ses vangofrapojn al la sinjorego sub protekto de siaj dungitoj kaj policistoj. Ankaŭ Maisie, filino de Terbanks, klopodis por haltigi la frenezan agon de Tenson kaj vizitis lin por traktado, sed ŝi trovis ke la viro estas fervola kaj kategorie rifuzis kompromisi. Anstataŭ venki la malamikan viron, ŝi falis en amon al li.

Inter la linioj de parto de la romano, oni povas percepti akuzecon de la aŭtoro pri la maljusteco de la socio al la laboruloj, sed la historio finiĝis je neatendita feliĉa geedziĝo de la mizera sed brava Tenson kaj la dorlotita filino de la ŝtalreĝo. Lerta aranĝo de la komplika intrigo de la romano faris la verkon streĉe interesa, kaj tamen en la ĝenerala amuzo estas iom da akuzo.

Eŭlalia, laboristino de iu filmfabriko, havas ĝemelan fratinton kaj tre maljunan avinon ciganan, sed ŝi mem estas provtuba infano de riĉaj gesinjoroj. Ŝi estis forŝtelita de cigano kaj la sola objekto ricevita de ŝiaj gepatroj estas kolĉeno kun medaliono. Iutage, dum inspektado de la filmproduktejo, la ministro, kiu estas la vera patro de Eŭlalia, hazarde rimarkis la konatan kolĉenon kaj interesiĝis pri la deveno de la knabino. Poste li venigis ŝin en sian loĝejon kaj provis fari esploron pri ŝia deveno, sed Eŭlalia suspektis lian bonkorecon kaj maltrankviliĝis pro tre verŝajna fiintenco de la altrangulo. Ŝi

forkuris de lia domo kaj klopodis sin kaŝi por eviti malfeliĉon, kaj tiu neatendita akcidento plimalfaciligis la vivon de la laboristino, anstataŭ ŝin feliĉigi. Krom la avino, ŝi devas ankaŭ prizorgi la infanon de sia fratino! Ankaŭ en tiu ĉi originala romano oni povas detekti iom da akuzo pri socia maljusto. Ankaŭ tiu ĉi rakonto finiĝis per feliĉo de la heroino, ĉar filo de fabrikoposedanto donis necesajn helpojn al Eŭlalia ĝustatempe, enamiĝis al ŝi kaj edziĝis al ŝi je la fino. Ankaŭ la gepatroj de Eŭlalia finfine sukcesis konstati, ke ŝi estas ĝuste ilia perdita infano el provtubo kaj la familio reunuiĝis post multe da epizodoj disigaj kaj klopodoj religaj. Legante la romanon oni povas senti influon de la majstroj Victor Hugo kaj aliaj.

Koncerne al la lingvouzoj — kio estas grava por verkoj en Esperanto, laŭ mia opinio — oni povas diri, ke malgraŭ kelkaj evidentaj preseraroj kaj plumeraroj, la romanoj “Sep Vangofrapoj” kaj “Eŭlalia” estas taŭgaj legaĵoj por progresantoj. Neeblas por mi citi ĉiujn rimarkindajn freŝajn kaj utilajn esprimojn, sed mi donu kelkajn ekzemplojn. El “Sep Vangofrapoj”: la ŝtalreĝo *tranĉe* kaj senkompate alrigardis lin; sed la dua (vangofrapo) jam ne povos sukcesi... *laŭhome* estus neeble; li faris nenion... li *cigaris* kaj atendis; futbalfanatikuloj; la... kurado ĉiam pli kaj pli vekis la diablon de malsato en sinjoro Terbanks; lia fervoro ne pariĝis kun (lia) lerto.

(Daturigo sur p. 26)

# Ĉina ĉigong-o

de XU SHITIAN

## IV. KVIETA ĈIGONG-O DE TAOISMO — ŜJAGŬAN-METODO

Historiaj materialoj de taoismo diras, ke en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 23 p.K.) de Ĉinio vivis tri fratoj de Mao-familio, kiuj kreis Maoshan-skolon de la taoisma ĉigong-o. La taoistoj de Maoshan-skolo sin ekzercis ĉefe per la metodaro de kvieto, kiu konsistas el ŝjagŭan-, ŝangŝi- kaj gujĝen-metodoj. Oni diras, ke dank' al ekzercado per la metodaro, multaj fariĝis eminentaj ĉigongistoj.

Ĉi-sube mi konigos al vi la bazan metodon ŝjagŭan.

Ekzercante vin per ŝjagŭan-metodo, vi povas teni vin en ajna pozo montrita en la bildoj 1-4.

Sidante en la preferata pozo, fermu la okulojn kaj buŝon, premu la supran makzelon per la langopinto, malstreĉu la vizaĝajn muskolojn kaj spiru senĝene.

Fiksu vian atenton sur la loko, meze de la genuoj, sed iom pli

antaŭe (ne sur la planko), kva-zaŭ vi kontemplus tiun ĉi lokon.

Kun ripetado de ekzercado, ĉe la loko, sur kiu vi fiksas vian atenton, aperas lumoj, jen nigraj, jen flavaj, jen purpuraj.

Tiaj lumoj aperas ekskluzive ĉe kvieto. Sen kvieto ili ne aperas. Kaj plie, pro la diferencoj de la sanstato, aĝo k.a. de la ekzercantoj, la lumoj aperas frue aŭ malfrue. Ne ekscitiĝu, kiam ili aperas dum la ekzercado, alie vi malsukcesos.

Dum la ekzercado per ŝjagŭan-metodo, antaŭ ĉio, aperas buntaj lumoj, kio montras, ke la korpo estas en reguligo. Post kiam la sistemoj de la organismo estas bone reguligitaj kaj ekvilibritaj, la lumoj fariĝas blankaj. Se la blankaj lumoj estas nebulecaj aŭ blindigaj, tio estas ne ideala. La normalaj lumoj devas esti similaj al helaj lunlumoj, ne malhelaj, nek blindigaj. Kun pliiĝo de ekzercado, el la blankaj lumoj aperas blanka lum-globo, kiu iom post iom malgrandiĝas kaj fine fariĝas malgranda kiel rizgrajno.


La naskiĝo de blankaj lumoj kaj lum-globo montras, ke la ekzercanto estas en bona kvieteco. La daŭra ekzercado estas tre utila. Ĝi povas kuraci malfacile kuraceblajn malsanojn, plivigligi la ekzercantojn, longe bonhumorigi ilin kaj fari ilin amikaj al aliaj.

Dum la ekzercado povas okazi halucino. Ekz., iuj sentas, ke ili estas grandaj kiel monto aŭ malgrandaj kiel rizgrajno. Aliaj sentas, ke antaŭ iliaj okuloj aperas maro, monto, arbaro, bestoj aŭ eĉ demonoj en mitoj, kiuj sin ĵetas al ili kun minacaj gestoj. En la ekzercado la halucino estas normala fenomeno kaj tute ne timinda. Se aperas bela fenomeno, ne avidu ĝin. Lasu ĝin aperi kaj malaperi tute nature. Kiam la sistemoj de la organismo estas bone reguligitaj kaj la ekzercanto estas en kompleta kvieteco, tia halucino ne plu aperos.

Se vi estas ĝenata en la ekzercado, ne ekscitiĝu, sed daŭrigu vian ekzercadon, ĝis la humoro tute kvietigos.

Por fini la ekzercadon unue turnu viajn okulglobojn kelkajn fojojn, malfermu la okulojn kaj post tio iomete turnu la kolon, ŝultrojn kaj talion kaj fine disigu la krucitajn kruojn. Stariĝu kaj iru, kiam la nesensiveco de la kruoj tute malaperas.

La ekzercadon faru ĉiutage unu aŭ du fojojn, po 30-60 minutojn ĉiufoje. ■





# Patrino admono ● Sanktulo

## ● Filozofia rezono

de HOU JUELIANG

**E**N la infaneco, same kiel aliaj infanoj, mi estis tiom vigla kaj parolema, ke eĉ manĝo kaj dormo ne povis silentigi min. Sed la patrino malpermesis tion. Ŝi kolere admonis: "Silentu dum la manĝado, bridu la langon en lito." Ŝi citis antikvan diron. Mi ne povis tute kompreni ĝin, tamen mi perceptis la signifon. Tial, kiam la patrino riproĉis min, mi konsciis mian babilemaĉon.

Poste, kiam mi lernis en universitato, mi legis *Analekton de Konfuceo*, gravan klasikaĵon de la konfuceanisma skolo en la antikva Ĉinio. Legante ĝin, mi surprizigis: Ha! La riproĉaj vortoj de la patrino ja originis el ĉi libro! Sed strange! La patrino estis analfabetino. Kiel ŝi povis scii tiujn vortojn de Konfuceo? Longe pripensinte, mi fine komprenis, ke Konfuceo estis unu el la plej grandaj saĝuloj en la antikva Ĉinio. Liaj paroloj kaj pensoj donis grandan influon al la ĉinoj de generacio al generacio. Jen kial mia patrino, kvankam analfabeta, sciis iujn vortojn de Konfuceo.

Konfuceo (551-479 a.K.) estis pensulo, edukisto kaj fondinto de la konfuceanisma skolo. Liaj prapatroj estis nobeloj, sed poste la nobleco perdiĝis, kaj la familio dekadencis generacio post generacio kaj tute malprosperis, kiam Konfuceo naskiĝis. Kiam li estis 3-jara, lia patro mortis, kaj 17-jara, li perdis la patrinon. Jam en la infaneco li ŝatis lerni la antikvan dekretan kaj regulan sistemon. Dank' al tio, li ekkonis socian etiketon kaj gajnis altan

renomon. Iuj nobelaj idoj prenis lin kiel sian instruiston kaj lernis ĉe li etiketon. En la juneco Konfuceo malsukcesis en oficista kariero. Pro malriĉeco li plenumis multajn okupojn, ekz., procedi pri funebrado por aliaj, servi kiel kontisto, paŝti bovojn kaj ŝafojn kaj gardi tenejon. En la aĝo de pli ol 50 jaroj li debutis en oficista rondo. Pro sukcesoj en la ofico li fariĝis ĉefministro de Lu-regno. Sed la fortuna favoris lin ne longe, post tri monatoj li perdis la oficon. Tiam en Ĉinio regis tumulto kaj kaoso, ĝin dividis lokaj reĝimoj, kiuj ĉiuj okupis iujn terenojn kaj starigis sian propran reĝimon. Konfuceo pledis por restarigi socian politikan ordon per serio da antaŭaj politikaj sistemoj. Tamen lia aserto estis tute ne taŭga. Ne volante esti senfara, li kun siaj lernantoj vojaĝis ĉevalĉare de Lu-regno al diversaj regnoj por prezenti siajn politikajn opiniojn. Li vagis 14 jarojn kaj neniu regnestro aĵprenis liajn politikajn opiniojn. Ankaŭ popolaroj ne komprenis lin. Ili ne donis al li manĝon nek montris al li vojon, dirante, ke li faras ion nesukcesigeblan, kaj iuj eĉ insultis lin kiel "vagantan hundon". Spite al la moko, li penadis por sukcesi sian karieron. Li malestimis la ermitojn, insultante, ke ili estas bestoj, kun kiuj li ne povis esti.

En la aĝo de 68 jaroj Konfuceo revenis al sia hejmlando. Tiam li rekomencis sian edukatan laboron. Li rompis la monopoligon de la eduka afero far la registara instanco kaj la unua funkciigis privatan lernejon. Li fariĝis la plej frua edukisto en la ĉina historio.

Li pledis por edukado al ĉiaj homoj, ĉu riĉuloj ĉu malriĉuloj, ĉu nobeloj ĉu ordinaruloj, kaj por la spirito "estu nesatigebla en lernado kaj senlaca en instruado". Sed li malestimis lernadon de grenkaj legom-plantado, emfazante, ke "nobeloj lernas etikon por ami aliajn, dum ordinaruloj — por esti pli obeemaj al aliaj". Samtempe kun instruado Konfuceo persone editoris antikvajn kulturajn klasikaĵojn. La plena antikva poemaro *Ŝiging (Poezia Libro)* origine enhavis diversajn poemojn. Li faris forstrekon kaj revizion, kaj fine restigis nur 305 en tri kategorioj. Tio estas la nuna *Ŝiging*. Li ankaŭ verkis la unuan valoran historian libron de Ĉinio *Printempo kaj Aŭtuno*. Li per lakonaj, precizaj kaj sentoriĉaj vortoj montris siajn sintenon, amon kaj malamon. Menzio, antikva ĉina filozofo, diris, ke la verko *Printempo kaj Aŭtuno* de Konfuceo timigis perfidajn oficistojn kaj rabistojn.

En la tempo de Konfuceo regis superstiĉo pri fantomoj kaj dioj, pro neevoluinta naturscienco. Konfuceo tamen ne estis tiel pia al fantomoj kaj dioj. Li diris, ke estas sufiĉe iom montri respekton al fantomoj kaj dioj, tamen oni devas teni sin distance for de ili. Tio estas "respekti fantomojn kaj diojn en certa distanco for de ili". Iu demandis Konfuceon: "Ĉu vere ekzistas fantomoj kaj dioj?" Li respondis: "En kultado, se vi sentas la ekziston de dio, ĝi do ekzistas." "Sed kio do, se oni ne sentas la ekziston?" Konfuceo ne donis plian klarigon. Certe la implicita respondo estas, ke ĝi ne



ekzistas. Tiamaniere li lerte neis la ekziston de fantomoj kaj dioj. Li mem ne kredis je fantomoj kaj dioj, tial li ne emis paroli pri ili generale. Foje, kiam lia lernanto Ji Lu konsultis lin pri oferado al fantomoj kaj dioj, li iom malpacienciĝis kaj respondis kolere: "Kial ni zorgu pri fantomoj kaj dioj, kiam mankas al ni tempo por trakti homajn aferojn?" Kiam Ji Lu demandis pri morto, Konfuceo respondis: "Kiel ni sciu pri la morto, se ni ne scias pri la naskiĝo?" La nekredo je fantomoj kaj dioj estas materiisma elemento en la filozofia penso de Konfuceo kaj manifestas liajn progresemon, eminentecon kaj filozofan prudenton.

Konfuceo opiniis, ke ĉiuj homoj denaske estas proksimaj unu al alia en la naturo. Poste, pro malsamaj medio kaj edukiteco la homoj multe diferencas en karaktero kaj kutimo. Li opiniis, ke homoj denaske estas filantropoj. Li esperis, ke ĉiu homo fariĝos filantropo, kiu devas ami aliajn, esti

humana kaj simpatia al aliaj. Filantropio estas humaneco, kiu postulas, ke oni rigardu homon kiel homon. Konfuceo, kiu vivis antaŭ 2 400 jaroj, jam donis atenton al digno kaj valoro de homo. Filantropio estas la kerno de la konfucea penso kaj montras ĝian progresan tendencon. Konfuceo diris ankaŭ, ke "komandanto de armeo povas esti anstataŭita, tamen la spirito de ordinara homo ne". Kial la "spirito" ne povas esti anstataŭita? Ĉar ankaŭ ordinara homo havas siajn nehumiligoblajn karakteron kaj volon. Tiuflanke Konfuceo certigis la sendependan volon, t.e., sendependan karakteron de homo. Li ofte prenis filantropion kiel moralan kriterion. Li postulis, ke en rilatoj kun aliaj, oni montru filantropion: ami la gepatrojn, estimi pliaĝulojn, esti amika al fratoj, indulgema kaj komprenema al aliaj, kaj pagi bonon por malbono. Konfuceo emfazis aparte, ke oni rilatu kun aliaj laŭ la principo de lojaleco kaj pardonemo, bonkore kaj prudente traktu problemojn.

Li diris: "Se vi mem intencas sukcesi, sukcesigu ankaŭ aliajn; se vi mem intencas atingi, atingigu ankaŭ aliajn"; "ne trudu al aliaj, kion vi mem ne deziras." Lia plej alta idealo estas universaligi filantropion. Li alte taksis la moralan valoron de filantropio. Li pledis por filantropio, kiam aperis la konflikto inter vivo kaj filantropio. Li esperis, ke ĉiu homo estos filantropia kaj altruisma. Li diris: "Filantropo ne damaĝas sian filantropion por vivteno, sed por filantropio li povas oferi sian vivon." En sia instruado li praktikis la filantropian penson, por ke liaj lernantoj havu filantropion. Konfuceo estis homama. La amo kuragiĝita de li superis religian kaj sanglinian kategoriojn, sen diferenco inter malproksimumoj, intimumoj, nobeloj kaj ordinaruloj. Bedaŭrinde, unuflanke li rekonis, ke ĉiuj homoj estas homoj, aliflanke li emfazis la diferencojn inter nobeloj kaj ordinaruloj. Unuflanke li pledis por universala filantropio, aliflanke li gardis la feŭdan hierarkion.

Rilate la kontraŭdiron inter pravo kaj malpravo, Konfuceo propagandis la principon de la ora mezo, nome eklektikan filozofion, kaj oponis kontraŭ akriĝo de kontraŭdiroj, kontraŭ ekstremaj opinioj kaj rimedoj. Li opiniis, ke por fari kompromison oni devas serĉi iun "mezan punkton" inter du kontraŭaj ekstremoj, kliniĝante nek al unu nek al la alia. Ĉu "'troeco' estas iom pli bona ol 'nesufiĉeco'"? la respondo: "Ili ambaŭ estas nebonaj." La tezo de Konfuceo pri la ora mezo havas profundan influon sur la postaj generacioj, ke eĉ mia neklerigita patrino komprenis ĝin. Mi memoras, ke foje en la infaneco, preparante novjaran donacon al parenco, mi ne sciis, kiom da ĝi plej konvenas. Mi do konsultis mian patrinon pri tio. Ŝi respondis: "Nek tro multe nek tro malmulte!" La vortoj de mia patrino estis nenio alia krom speguli la tezon de Konfuceo pri la ora mezo. Nature, por gravaj problemoj de pravo kaj malpravo, lia



tezo pri la ora mezo ne taŭgas. Tiukaze al la kontraŭdiro inter la pravo kaj malpravo konvenas neniu akordo aŭ kompromiso, kaj necesas subteni unu kaj oponi kontraŭ la alia, por definitive solvi la problemon.

La konfuceanisma skolo estas la plej frua filozofia skolo de la antikva Ĉinio, kun multaj disĉiploj kaj granda influo. En la pasinteco konfuceanismo estis nomata Famega Doktrino. Nelonge post la forpaso de Konfuceo, la konfuceanisma skolo dividiĝis en ok sektojn, interalie, la du sektoj, reprezentataj de Menzio kaj Ŝjunzio, estis la plej influaj al la sekvaj generacioj. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) konfuceanismo disvolviĝis en teologion, en Song-dinastio (960-1279) en objektivan ideismon kaj en Ming-dinastio (1368-1644) en subjekti-

van ideismon. En 770-221 a.K., krom konfuceanismo, neniu doktrino de la diversaj skoloj povis esti heredita generacio post generacio. Konfuceanismo estis aktiva kaj ne pesimisma al la vivo. Ĝi ne kultis feojn, kiel taoismo, nek memkulturis por “refoja naskiĝo”, kiel budhismo. Legante *Analekton de Konfuceo*, oni povas vidi la figuron de Konfuceo. Li estis homo aktiva, progresema, zorgema pri la lando kaj popolo, optimisma kaj grandanima. Li mem diris: “Mi forgesis manĝadon pro absorbiĝo en laboro kaj personajn zorgojn pro ĝojo, ne konsciante la proksimiĝon de maljuneco!” Li diris al sia lernanto: “Kia ĝojo estas restudado de lernitaj objektoj! Kia ĝojo estas renkonti amikon venintan de malproksime! Kia ĝentilulo oni estas, se oni ne koleras nekom-

prenata!” Li esperis, ke liaj lernantoj fariĝos tiaj ĝentiluloj. Sed tio estis malfacile efektivebla, eĉ li mem ne realigis tion. Jen lia krio en la lastaj jaroj: “Min neniu komprenas!” “Min komprenas nur la ĉielo!”

Konfuceo estis malestimata antaŭ la morto, sed honorata post la morto. Ekde Han-dinastio la feŭdaj regantoj de diversaj dinastioj honoris lin kiel “sanktulon”, donante al li la titolon “Plej Sankta Instruanto”. Konfuceanismo estis la reganta penso dum pli ol 2 000 jaroj de Ĉinio kaj havis tre grandan influon. Memore al li, oni konstruis templojn en diversaj lokoj de la lando. En lia hejmloko Qufu, Shandong-provinco, estas la Konfucea Domo, kiun frekventas vizitantoj. ■

## POR KOMENCANTOJ

# Estiĝo de vaksa tinkturo

**M**JAŬ-OJ en la suda Sichuan-provinco de Ĉinio antaŭ longe lertiĝis en teksado. Ili faris el diverskoloraj floroj farbojn, kaj per ili kolorigis la teksaĵojn.

Estis saĝa knabino. Ŝi deziregis ŝanĝi la kolorojn de la vestoj de la junulinoj, sed ne trovis bonan metodon. Ŝi tre ĉagreniĝis kaj ofte dronis en pensado. Foje ŝi refoje dronis en pensado kaj endormiĝis. En sonĝo ŝi vidis feinon en belaj vestoj, kaj tiu kondukis ŝin en ĝardenon plenan de aromaj floroj. Tie kantis birdoj, dancis papilioj



kaj diligente laboris abeloj. La knabino iris tien kaj ĉi tien, sorĉite de la bela vidaĵo, kaj ne rimarkis, ke sur ŝiaj vestoj kolektiĝis multe da abeloj, kaj tiuj bestetoj restigis sur ŝiaj vestoj multajn makulojn. Kiam la knabino vekigis el la sonĝo, ŝi vere vidis la makulojn sur siaj vestoj. Ŝi metis la vestojn en

akvon por lavi, sed ŝi ne sukcesis forigi la makulojn. Ŝi do metis ilin unue en tinkturan barelon kaj poste en bolantan akvon por fiksi la koloron. Sed kiam ŝi prenis la vestojn el la akvo, ŝi estis surprizita, ke la makuloj antaŭe kovritaj de nektaro formis belan desegnon. Inspirite de tio, la sprita knabino ekhavis novan ideon. Ŝi fandis vakson kaj desegnis per ĝi florojn kaj bestetojn sur ŝtofo. Kiam la vakso solidiĝis, ŝi metis la vestojn en tinkturan barelon, poste en puran akvon por lavado. En la bolanta akvo la koloro fikse restis sur la ŝtofo. La vakso refoje fandiĝis en bolanta akvo, kaj la partoj de la ŝtofo antaŭe kovritaj de vakso montriĝis senkoloraj. La kolorigitaj kaj senkoloraj partoj sur la sama ŝtofo kune formis belan bildon. La knabino ekkantis pro sia sukceso. Ŝi instruis sian novan metodon al siaj kamaradinoj kaj de tiam herediĝis la metodo ĉe mjaŭ-nacio. ■

# La karnavalo de Binche

Fotoj de LI HAIYAN kaj WEI LIJUN

**L**A karnavalo de Binche aperis en la 14-a jarcento. En la Karnavala kaj Mas-ka Muzeo, la sola en la mondo, en Binche, Belgio, konserviĝas historiaj materialoj, vestoj kaj maskoj de la unuafoja karnavalo en 1549. De post tiam la karnavalo de Binche okazas ĉiujare kaj oni portas eĉ hodiaŭ la tradiciajn karnavalajn vestojn kaj maskojn. Ĝuste pro tio, la belgoj diris, ke Binche estas karnavala urbo.

En 1990 la karnavalo komenciĝis en la 25-a de februaro. Frumatene, en la 4-a ekviglis Binche, urbeto kun 9 000 loĝantoj. Je la 9-a, sur la stratoj

svarmis homoj. Iuj alivestis sin kiel persa princino, aliaj kiel hindaj komercistoj, la pajacoj kaj bestaj maskoj estas ŝatataj de la infanoj, dum la studentoj skribis per diversaj koloraĵoj bondezirojn en malsamaj lingvoj sur sia blanka ĉemizo. Ĉe leviĝo de muziko trupoj de homoj alivestitaj, kiel frenezuloj en karnavala vesto, kolektiĝis en la urbocentra placo. Ili-aj verdaj duonmaskoj, kurbaj lipharoj, korpulentaj figuroj faritaj per remburajoj kaj pezaj lignoŝuoj estas tre ridigaj. Oni ĵetas al la pasantoj kolorajn paperpecetojn kaj ŝaŭmplastajn pecetojn. Bolis la ravi-

taj homoj dancante kaj trinkante ĉampanon.

Je la 3-a posttagmeze manifestacio de alivestitaj homoj puŝis la karnavalon al nova tajdo. La impona kavalkado marŝas antaŭe kaj poste sekvas buntaj kvadrataj trupoj. Demetinte la maskon, la "frenezuloj" surhavis luksan ĉapon kamelanan. Ĉiuj portis korbon da oranĝoj ĉe la talio. Je ordono la oranĝoj hajle ĵetiĝis al la akklamantaj rigardantoj.

Falis la nokto, tamen daŭre viglis la tuta urbo kaj super Binche pompe ekfloris koloraj artfajraĵoj. ■

Alivestitaj dancantoj



Patro kaj filino en la karnavalo







Manifestaciantoj de la karnavalo

Knabinoj en la karnavalo



# Vizito de la Ekspozicio de Elitaj Historiaj Objektoj de Ĉinio

de WU QIN kaj YU YING

**E**LPASINTE el Wenhua-halo de la Imperiestra Palaco mi sentis, ke daŭre brilas antaŭ miaj okuloj la bela bronzaĵo, la humura argila aktoro kaj la luksaj tri-koloraj porcelanaĵoj.

De junio ĝis decembro 1990, la nomita ekspozicio okazas en Wenhua-halo. Tie vidiĝas 245 grupoj da valoraj kulturaj antikvaĵoj, kiuj montras la historiajn fizionomiojn kaj kulturajn enhavojn de pluraj dinastioj de Ĉinio. Estas la unua fojo en Ĉinio, ke en la ekspozicio vidiĝas nove elterigitaj objektoj tiel altklasaj.

Fosilia kranio de 5-jara simio-homo kondukis mian penson al la prahistoria periodo antaŭ 4 milionoj da jaroj. Tiu ĉi fosilio, elterigita en Yuanmou-gubernio de Yunnan-provinco en printempo 1988, estas pli simila al tiu de la prahomoj ol la fosilioj elterigitaj aliloke pli antaŭe. Tiu grava trovo plenigis la blankon de la fosilia kranio de prahomoj en plioceno de Ĉinio.

La sekreto de "subtera regno" estas malkaŝita. La trovita granda kvanto da laboriloj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj el ŝtono, ostoj, ligno kaj fajenco montras, ke tiam niaj prapatroj jam eliris el ĥaoso kaj finis la primitivan periodon, kiam oni manĝis bestojn kaj birdojn krudaj. En Hemudu de Yuyao-gubernio, Zhejiang-provinco, oni elterigis nigran fajencan poton, sur kiu videblas simpla desegno de kuranta porko kun pinta buŝo, dika ventro kaj hirtaj kolharoj. Ĝi montras, ke jam antaŭ 7 000 jaroj sovaĝaj bestoj estis bredataj.

La atingoj de la primitivaj artoj evoluis kun disvolviĝo de la produktado. En Wuyang-gubernio de Henan-provinco oni elterigis fluton kun sep truoj, faritan el krur-osto de rabobirdo. Post ekzameno oni konstatis, ke ĝi jam havis sep gamojn. Antaŭ 7 000 jaroj, eble ĝuste per tiu ĉi fluto muzikisto ludis la unuan movimenton de bela popola muziko.

El la eksponataj historiaj objektoj tre allogaj estas la delikataj jadaĵoj de Liangzhu-kulturo (speco de neolitika kulturo de Ĉinio unue trovita en Liangzhu de Zhejiang-provinco ĉe la malsupra baseno de Yangzi-rivero). Sur jada kultilo cong-o (kvarangula koloneto kun ronda truo en la mezo) alta je 8.8 centimetroj, vidiĝas gravuritaj homvizaĝo kaj bestvizaĝo. Ĝi impresas mistere. Arkeologo Li Jiufang diris: "Tiu ĉi kulta ceremoniilo montras la ideon de niaj antaŭuloj pri la monda origino." Li ne komprenas, kial oni povis fari tiel delikatan jadaĵon en la tempo, kiam mankis metala instrumento. Ĉe la baseno de Liaohu-rivero oni elterigis jadaĵojn de Hongshan-kulturo. Ili krudaj kaj simplaj estis faritaj en la sama tempo, kiel tiuj de Liangzhu-kulturo. Tiuj ĉi du historiaj lokoj estas gravaj por la ĉina arkeologio, dank' al kio la historia esploro pri la ĉina civilizacio estas fruigita de 4 000 jaroj al 5 000 jaroj, kaj la origino de la ĉina antikva civilizacio ampleksas ankaŭ pli vastan regionon krom la baseno de la Flava Rivero.


Zhongshan-regno estis fondita de ŝjanju-oj en la lastaj jaroj de la

Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). Ĝi situis en la hodiaŭa Hebei-provinco. En 1978 oni elprenis aron da delikataj bronzaĵoj el la tombo de la princo Xi de Zhongshan-regno en Pingshang-gubernio de Hebei-provinco, kiuj estas preskaŭ neglektitaj pro manko de historiaj materialoj kaj malfermis brilan paĝon de la bronza kulturo. Inter la prifositaĵoj estas damaskenita bronza tigro. La tigro mordas cervon kun mallevita kapo, larĝe malfermitaj okuloj, starigitaj oreloj kaj suprenlevita vosto. La feroca mieno estas prezentita versimile. Fari tian artaĵon estas malfacile eĉ por la nunaj eminentaj metiartistoj.


Ankoraŭ ne ĉesis ondi mia admiro, mirigis min la buntaj historiaj objektoj de la granda unuigita imperio de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.). La vesto de Liu Sheng, Jing-princo de Zhongshan-regno, el jadpecoj, interligitaj per oraj fadenoj, trovita en Mancheng, Hebei-provinco estas elterigita plej frue en Ĉinio. Antaŭ tio, kvankam oni elterigis apartajn jadpecojn, tamen ili ne sciis, por kio ili servis. Liu Sheng estis nomumita Zhongshan-princo en 154 a.K. kaj mortis en 114 a.K. Lia vesto konsistas el 2 498 jadpecoj, ligitaj per 1 100 gramoj da oraj fadenoj. Estas bone konservitaj ĉiuj liaj kunentombiĝaĵoj, inkl. de la jadaĵ naztruoj kaj oretruoj ŝtopiloj.

Goujian, reĝo de Yue-regno (? — 465 a.K.), estis iam venkita en milito kontraŭ Fuchai, reĝo de Wu-regno. Venkita, li dormis sur pajloj kaj gustumis galon ĉiu-





Bronza muzikilo (Okcidenta Zhou-dinastio)



Birdforma bronza vinujo (770-476 a.K.)

matene por firmigi sian volon venĝi al sia malamiko. Dank' al pena strebado, potenciĝis lia regno kaj li fine pereigis Wu-regnon. (Pri tiu ĉi anekdoto legu la libron "5 000 jaroj de Ĉinio" p36-p38. Esperantlingvan, eldonitan de la Ĉina Esperanto-Eldonejo) 18 jarojn post la elterigo de spado de Goujian, oni elterigis lancon de Fuchai en la loko distanca je 1 kilometro for de tiu de Goujian. Nun daŭre brilas la armiloj, tamen antaŭ longe malaperis iliaj posedantoj, kiuj longtempe estis malamikaj unu kontraŭ la alia en la historio. La historia ŝanĝiĝo estas vere meditiga.

Tie estas la plej frue elterigitaj objektoj: botforma ceramika akvujo, flaviĝinta papera mapo, bronza tableto muldita per vaksa modelo kaj ora stampilo kun drakforma tenilo k.a. Ĉiuj ĉi montras la saĝon de la antikvaj laboruloj de Ĉinio. Ili estas vere admirindaj! Rigardante tiujn trezorojn, ni nature dankas la prifosantojn, kiuj portis ilin el kvietaj subtera mondo. Ja romantika estas ilia laboro. Ĝuste ili famigis en unu nokto la lokojn tute nekonatajn tra la mondo.

En somero 1983, vigla estis la konstruejo sur la supro de


Xianggang-monto ĉe la strato Jiefang, Kantono. Kiam buldozo malfermis la grundon dikan je 17 metroj, vekigis la "subtera regno" dormanta 2 000 jarojn. En pli ol unu monato, spite varmegon de 37°-38°C, arkeologoj el aliaj lokoj de la tuta lando balais la maŭzolean galerion, malfermis ĝiajn ŝtonajn pordojn, prifosis la katakombon. La arkeologoj surgenue aŭ kuŝante ŝovelis, skrapis kaj brosis. Kiam ili trovis ore brilantan stampilon kun drakforma tenilo inter malordaj jadaĵoj, ili eksciis, ke la mastro de la maŭzoleo estis neordinara homo. Ili estis forte mirigitaj. Tio estis stampilo de Zhao Mei, la dua imperiestro de la Suda Yue-regno, kaj la plej frue trovita imperiestra stampilo. Ĝi atestas la fakton notitan en historiaj libroj, ke la loka separatista potenco uzurpis la imperiestrecon.

En la ekspona halo estas la plej nove elterigita historia objekto: ĉaro tirata de senpiedigita homo. Ĝi estas elterigita en tombo de la Okcidenta Zhou-dinastio (ĉ. 11-a jc. a.K. — 771 a.K.) en la vilaĝo Shangguo en Wenxi-gubernio, Shanxi-provinco. La ĉaro, 9.1 centimetrojn alta kaj 13.7 centimetrojn longa, estas ornamita per

birdaj kaj bestaj figuroj. Ĝi montras la sferon pri besta bredado. Sklavo, kies piedo estis desegita, gardas la pordon. Tio atestis la staton en la sklava Okcidenta Zhou-dinastio en la 11-a jarcento a.K. kaj tute konformas al la koncernaj notoj en la historiaj libroj.

Tiu ĉi valorajo estis elterigita kune de Zhang Chongning kaj Ma Gang de la Arkeologia Instituto de Shanxi-provinco. En aŭgusto de la lasta jaro, kiam ili eniris en la 89-an tombon malbonodoran, ili elfosis nur apartajn ceramikajn pecojn. Ili daŭre laboris kvar monatojn, sed akiris ne multon. Ili ne perdis la esperon kaj daŭrigis sian atenteman serĉadon per tri-denta rastilo. Subite Zhang Chongning tuŝis malmolan pecon en la mola tero, li tuj elfosis ĝin per siaj manoj. Ho! aperis antaŭ li verdigra peco. Kun forta korbataĵo li elprenis la elterigitajn kaj vidis bronzan ĉaron kun du grandaj kaj kvar malgrandaj radoj. Li forviŝis teron de sur ĝi kaj trovis, ke ĝiaj 15 lokoj estas moveblaj: ĝiaj radoj estas turneblaj, kovriloj kaj pordoj malfermeblaj, riglilo enŝovebla. La kvar birdoj sur la kovrilo de la ĉaro estas turneblaj de delikata blovo. Jen denove aperis multekosta trezoro. ■






Čaro tirata de senpiedigita homo (Okcidenta Zhou-dinastio)

Bunte glazurita aĵura vazo (1644-1911)





Argila aktoro (Orienta Han-dinastio)

Damaskenita bronza tigro  
(475-221 a.K.)





# La palaca ĝardeno kaj murdo

Teksto de MU YI


Fotoj de YAN JIN

**N**ORDE en la ruĝa ĉirkaŭmuro de la Imperiestra Palaco estas ĝardeno ombrata de antikvaj pinoj, cipresoj kaj diversaj verdaĵoj. Tie estas la fama palaca ĝardeno por imperiestroj kaj iliaj edzinoj en la dinastioj Ming kaj Qing.

La ĝardeno areo estas 12 000 kvadratajn metrojn. En la ĝardeno la konstruaĵoj projektitaj de ĝardenarkitektoj estas majstre dispoziciitaj kaj dekoraciitaj per maljunaj cipresoj, prosperaj floroj, rokaĵoj kaj aliaj ornamaĵoj. La agrabla kvieteco en la ĝardeno draste kontrastas kun la soleneco en la palaco.

Qin'an-halo situas en la centro de la ĝardeno kaj servis kiel loko por kultado al dioj. La aliaj konstruaĵoj havas siajn lokojn simetrie ambaŭflanke de la halo. Ĉiu konstruaĵo estas malsama al la aliaj en la arkitekturo kaj dekorado.

## PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-roj 11 kaj 12 en la plano signas la palacan ĝardenon kaj Shunzhen-pordon.

Kvankam iuj estas samaj en la arkitekturo, ili tamen ne impresas per monotoneco pro tio, ke la konstruaĵoj estas apartigitaj per la halo, arbaretoj kaj bambuaroj. En la ĝardeno estas 12 kioskoj ne-grandaj, diversformaj kaj variaj en arkitekturo. Meze en la korto estas giganta bronza tripieda incensujo ĉirkaŭita de multo da en-vazaj miniaturaj pejzaĝoj, dume ĉe la ruĝaj ĉirkaŭmuroj svelte svingetiĝas bambuoj.

Nordoriente de Qin'an-halo estas rokaĵo nomata Duixiu, masonita el ŝtonoj en interesaj formoj. Sur ĝi jen leviĝas, jen malleviĝas ŝtonoj malglataj, muskoplenaj kaj ĉie vidiĝas rampaĵoj. Sur la fronto de la rokaĵo estas paro da ŝtonaj drakoj, el kiuj ŝprucas du akvaj kolonetoj. Je la certa alteco la akvokolonetoj fariĝas akveroj, kiuj faladas sur la muskajn ŝtonojn. Du ŝtuparoj en la orienta kaj okcidenta flankoj de la rokaĵo kondukas supren al la kiosko Yujing sur la kulmino de la rokaĵo. Tie oni povas vidi Xishan-montaron en la okcidenta antaŭurbo de Pekino kaj kompreneble ankaŭ la tutan palacon.

Menciindaj estas la vojetoj en la ĝardeno. Ĉiuj zigzagaj vojetoj inter la florbedoj estis pavimitaj per fajnaj ŝtonetoj en diversaj grandecoj. La ŝtonetoj formis pli ol 900 bildojn pri floroj, birdoj, insektoj, fiŝoj, bonaŭguraj desegnoj, historiaj legendoj kaj folkloroj.

Dum Qing-dinastio, en la sepa tago de la sepa monato laŭ la luna kalendaro ĉiujare, imperies-

troj kaj iliaj edzinoj venis en la ĝardenon por incensi al la steloj Bovisto kaj Teksistino (Altairo kaj Vego). En la Aŭtunmeza Nokto ili incensis al la luno. En la naŭa tago de la naŭa monato la imperiestroj kaj iliaj edzinoj ascendis la rokaĵon por havi panoraman vidon kaj kultu al la suno. Imperiestro Kangxi (1662-1722 sur la trono) plurfoje faris festenojn en la ĝardeno por la korteganoj kaj improvizis poemojn.

En 1853 imperiestro Xianfeng faris en la ĝardeno elektadon de belulinoj, kaj en tio okazis emocia heroaĵo. Iun tagon de la unua monato de la jaro 20 knabinoj en la aĝoj de 14-20 jaroj atendis elektadon en la ĝardeno. Ili atendis 6 horojn, sed la imperiestro ankoraŭ ne venis. La knabinoj ekploris kaj plendis pro malsato kaj timo, starante longe en la ĝardeno severe gardata. Eŭnuko zorganta pri la elektado skoldis ilin: "Ne ploru plu, alie la imperiestra moŝto koleros kaj punos vin per vipado, kaj tiam nenio helpas al vi!" Knabino elpaŝis kaj laŭte refutis: "Ni kontraŭvole forlasis niajn gepatrojn pro la devigo de la imperiestra dekreto. Nun en la lando regas malkvieto, sed la imperiestro, anstataŭ serĉi eminentulojn por la ŝtato, dronas en orgio, retenis ĉe si multe da knabinoj por sia amorguo. Ĉu saĝa imperiestro devus esti tia? Ĉu mi timus vipadon, kiam mi jam ne timas morton?" Ĝuste tiam venis imperiestro Xianfeng. Eŭnuoj ŝnurligis la knabinon kaj devigis ŝin peti indulgon de la imperiestro. Sed ŝi rifuzis genuiĝi. La imperiestro tuj





En la palaca ĝardeno

ordonis malligi ŝin kaj lasis ŝin ripeti la vortojn. La knabino sentime ripetis la vortojn, kaj la imperiestro demandis ŝin: “Ĉu vi vere ne timas morton?” Kaj ŝi respondis: “Se vi ordonos mortigi min, ĉiuj en la lando scios mian nomon, sed mi ne scias, en kian situacion vi, imperiestra moŝto, metos vin.” Tion dirinte, ŝi tuj iris frapegi sian kapon kontraŭ arbon por sinmortigo. La imperiestro tuj ordonis bari al ŝi la vojon kaj diris surprizite: “Vi eksterordinara knabino. Mi sendas porti vin hejmen.” Tion aŭdinte, la knabino tuj sin turnis for.

La norda pordo de la ĝardeno havas la nomon Shunzhen. Tie okazis murdo al imperiestro Jiaqing.

Matene de la 11-a de aprilo 1803, imperiestro Jiaqing revenis de la okcidenta antaŭurbo en la palacon. Kiam li atingis la nordan pordon Shenwu de la palaco, al li jetiĝis viro kun glavo. Li nomiĝis Chen De. Terurite de la surpriza atako, la imperiestro haste kuris en la pordon Shunzhen, kaj ankaŭ


la cent gardistoj estis ŝtonigitaj de la atako, ke neniu el ili havis la kuraĝon elpaŝi. Nur la plej proksimaj ses korteganoj kaj gvardianoj elpaŝis por rezisti. Chen De brave batalis kaj vundis du el ili. Sed finfine li estis venkita kaj arestita. Antaŭ kruela torturado

Chen De montris nenian timon.

Chen De estis pekinano kaj sklavo en mandarena domo. Li multe suferis de ofendiĝo, subpremo kaj ĉiaj malfeliĉoj. En senelirejo Chen De pretis riski la vivon por murdi la imperiestron.

Floroj disvolviĝantaj





La kiosko Yujing



Antikvaj arboj kaj bronza incensujo

Sed nenio rezultis el la torturado en kvar sinsekvaj tagnoktoj. Kaj la imperiestro ordonis distranĉi lin kaj pendumi liajn du filojn. Chen De montris neniom da timo pro la ekzekuto. Neoficiala historio tiel notis: "Ekzekutistoj unue detranĉis al Chen De la orelojn kaj nazon, poste la karnon de lia maldekstra brako peceton post peceto, kaj pli poste ili distranĉis lian dekstran brakon kaj fine fortranĉis la karnon peceton post peceto sur liaj brusto kaj dorso. Ĉe la unua tempo la korpo de Chen De sangadis, sed post certa tempo elĉerpigis la sango kaj elfluis nur flava likvaĵo. Kiam la karno de lia supra korpo estis fortranĉita, subite Chen De malfermis la okulojn kaj diris: "Rapide!" Sed la kontrolisto de la ekzekuto diris: "La imperiestra moŝto ordonis, ke vi suferu pli longe!" Chen De fermis la okulojn kaj silentis. La legenda noto en la neoficiala historio enkorpigis la simpatian kaj laŭdon de la popolo al



Chen De, kaj ankaŭ la indignon kaj kondamnon de la popolo kontraŭ la brutalaĵoj de la imperiestro. ■

Finiĝis en tiu ĉi numero la artikoloj sub la rubriko "LA IMPERIESTRĀ PALACO". En la pasintaj du jaroj niaj legantoj montris ŝaton por tiu rubriko kaj skribis al ni utilajn sugestojn kaj konsilojn, kio multe helpis la aŭtoron kaj la redaktoron. Ni kore dankas niajn legantojn.

La Red.



Bonaŭgura besto *ĉilin*



Qin'an-halo trans la pordo

Shunzhen-pordo



de LI QIANG



El la sennombraj ŝtonkavernaroj de Ĉinio la plej granda estas Mogao-ŝtonkavernaro de Dunhuang, Gansu-provinco. En la jaro 366 oni faris tie la unuan ŝtonkavernon. Poste, en 10 dinastioj dum pli ol 1000 jaroj, oni ĝin rekonstruadis. Kaj nun bone konserviĝas tie 492 kavernoj kun 2450 statuoj kaj freskoj kovrantaj areon de 45000 kvadrataj metroj. Oni nomas la ŝtonkavernaron galerio por koni historion, religion, kulturon kaj arton de Ĉinio.

Ĉinio jam emisiis du seriojn da poŝtmarkoj pri freskoj de Dunhuang. La poŝtmarkoserio, emisiita la 20-an de majo 1987, pre-

zentas freskojn de la Norda Liang-regno (397-439) kaj la Norda Wei-dinastio (386-534) kun la titoloj: Bodisatvoj, Rakonto pri Cervo-reĝo, Fluganta Feino kaj Gajeco en Devapuro (dekstre de la tria vico kaj la malsupraj tri pecoj). Samtempe oni emisiis blokon kun la bildo "Sattva satigas tigron" laŭ budhisma rakonto de la Norda Wei-dinastio. Kaj la aliaj kvar pecoj estis emisiitaj la 25-an de majo 1988 kun bildoj pri ĉasado kaj luktado de la Okcidenta Wei-dinastio (535-557) kaj pri plugado kaj pagodkonstruado de la Norda Zhou-dinastio (557-581).